



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Januaro 2020 n-ro: 49



Merhaba,

Herkese mutlu bir yeni yıl!
Kış artık kendini göstermeye başladı.

Yeni yılın bu sayısında da sizlere okumanız için güzel yazılar bulduk.

Bu sayıda:
Mühürlenmiş zaman köşesinde iki filmin birden anlatımını;
Yunan mitolojisinden Belerofon'un hikayesini;
"İnce Memed" romanının ikinci cildinin şiirsel anlatımı ile giriş kısmının tercümesini;
Franz Kafka'dan devam hikayelerini;
Sándor Szathmári'den güzel bir hikayeyi;
ve daha bir çok ilginç yazı bulacaksınız.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Feliĉan novan jaron al ĉiuj!
Vintro nun komencis montri sin.

En ĉi tiu nova numero ni trovis belajn tekstojn por via legado.

En ĉi tiu numero vi trovos:
Recenzon de du filmoj en la Tempo Sigelita angulo;
La rakonton pri Belerofono el la greka mitologio ;
La tradukaĵon de la poezia enkonduka parto de la dua volumo de la romano "Maldika Memedo";
Daŭrigajn rakontojn el Franco Kafko;
Tre belan rakonton de Sándor Szathmári;
kaj multajn aliajn interesajn tekstojn.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
"Bulgara Esperantisto" festas jubileon!	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Nova Libro de Julian Modest	4
Tempo Sigelita	5
BELEROFONO (ΒΕΛΛΕΡΟΦΩΝ)	6
Blogo de Eksedzo	8
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 20)	9
Maldika Memedo - vol 2 - enkonduko	10
Frosto	11
Anasofobio	12
El la libro de "Dao de Jing" (40)	12
Franco KAFKO (Franz Kafka)	13
Por Hori Jasuo	17
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	18
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
Dr. Isitobi Kozoŭ (parto 3)	21
Dimanĉa poezio: Stanislav Schulhof	22
Spegulo kaj Simio	23
Bildoj de iu ekspozicio	23
Tragedio pro la atombomboj	24
Statistikoj	25
Neandertalaj homoj pluvas (1)	26
Solvo de la krucvortenigmo	32
Kelkaj vortoj pri la mandolinj	27
Satiraj rakontoj -- de Sándor Szathmári	28
Unuiĝintaj Nacioj	29
Kial mi lernis Esperanton	30
Nova Jaro	30
Ni lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 12-a kaj 13-a de decembro, kadre de Zamenhofa Tago, okazis du kunvenoj por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

"Bulgara Esperantisto" festas jubileon!

Jam dum unu jarcento regule aperadas "Bulgara Esperantisto" – unu el la plej longvivaj periodaĵoj en Bulgario kaj en Esperantujo. Dekoj da elstaraj bulgaraj geesperantistoj redaktis kaj verkis por la revuo, kiu de la komenco estis ne nur asocia organo, sed ankaŭ tribunon por diverstemaj artikoloj, metiejo por verkemuloj kaj tradukantoj, informilo pri la E-movado kaj pri la socia kaj kultura vivo en la tuta mondo, peranto en privataj kaj negocaj interrilatoj ktp.



En pli frua tempo elstaris la nomoj de Atanas D. Atanasov – ADA, Asen Grigorov, prof. Stojan Ĝuĝev k.a., kiuj estis ne nur bonegaj esperantistoj, sed ankaŭ tre renomaj figuroj. Ne nur el la historio ni konas la nomojn de Nikola Aleksiev, Kunĉo Valev kaj Violin Oljanov, kiuj same havis jubileojn ĉi-jare.

Je la 12a de decembro 2019 okazis solenaĵo en Sofio. Partoprenis eksaj ĉefredaktoroj kaj parencoj de iamaj kunlaborantoj. Maria Jankova kaj Mariana Evlogieva rememorigis pri gloraj la 80-aj jaroj, kiam la revuo atingis 10000-ekzempleran eldonkvanton kaj havis multajn abonantojn eksterlande. Venelin Mitev rakontis pri la malfacilaj jaroj fine de la 20-a jarcento. La nuna ĉefredaktoro Georgi Mihalkov parolis pri la defioj antaŭ la revuo nuntempe.

Venis salutmesaĝoj el la tuta mondo.

Aperis 120-paĝa jubilea numero. Baldaŭ konsulteblos arkivo de "Bulgara Esperantisto" en la retejo espereto.com

verkis kaj sendis **Mariana Evlogieva** el Bulgario



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 60-a Internacia Esperanto-Sumoo
(de la 10-a ĝis la 24-a de novembro 2019)

1. Partoprenantoj: 308 el 35 landoj
2. Laŭlandaj nombroj : "... 28. Turkio: 1 ..."
3. Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 268 el 308 (87%)
4. Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 20000 paĝoj - Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la sumoo.
5. Komentoj:
 - a. Koreio tute ne leviĝis. Antaŭ la UK en Koreio la nombro superis 100. Kial tiel drasta falo okazis? Sen korea partopreno, la sumoo ne multe progresos.
 - b. Ĉi-foje svisaj gelernantoj partoprenis. Svisujo tute dependas de geknaboj.
 - c. Malaperis partoprenanto el Afriko. Tie estas diversaj problemoj por vivado.
 - d. El Oceanio fama verkisto partoprenis. (Trevor Steele)
6. Dankemon: Por tiu ĉi Sumoo laboris 15 prizorgantoj el diversaj landoj kaj unu esperantisto el Pollando, kiu zorgas pri nia retejo kaj diplomoj. Ni danku al tiuj kunlaborantoj.

Hori Jasuo (Japanio)

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>


Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 840 (2019-12-24)
Montrealo 2020: aliĝu favorpreze ĝis la 31-a de decembro!

Restas apenaŭ semajno antaŭ la fino de la plej favorpreza aliĝperiodo al la 105-a UK en Montrealo (1-8 aŭgusto 2020): frua aliĝo povos ŝparigi al vi 50 € aŭ eĉ 100 €! Jam pli ol 400 homoj el 44 landoj aliĝis, kio bele aŭguras sukcesan kongreson! [...]

N-ro 839 (2019-12-23)

Forpasis Mila van der Horst-Kolińska (1927-2019)

Mila VAN DER HORST-KOLIŃSKA (naskiĝis la 26-an de aprilo 1927 en Parafianów apud Vilno, mortis la 13-an de decembro 2019 en Hago) estis esperantistino ekde 1960 kaj Honora Membro de UEA. [...]

N-ro 838 (2019-12-23)

Forpasis William R. Harmon (1927-2019)

William R. HARMON (naskiĝis en 1927 en El Dorado, Kansaso) estis usona esperantisto. Li loĝis longan tempon en norda Kalifornio. Li forpasis la 27-an de novembro 2019 en maljunulejo en suda Oregono, Usono. [...]

N-ro 837 (2019-12-10)

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de Homrajta Tago, 10 decembro, kaj Zamenhof-Tago, 15 decembro, 2019

Ĉiujare, la 10-an de decembro, ni festas la Tagon de Homaj Rajtoj. Temas pri la dato en la jaro 1948 kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estis akceptita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. [...]

TEJO



Via mesaĝo al la mondo – Kontribuu al video de TEJO

por la Zamenhofa Tago

Partoprenu en la video de TEJO por ĉi-jara Zamenhofa Tago! Ni bezonas vian kontribuon kaj vian kreemon! Kaj ni volas amplifiki vian voĉon!

Esperantistoj loĝas en diversaj landoj, estas parto de malsamaj socioj kaj medioj, kaj havas diversajn zorgojn. Sed kompreneble ni ĉiuj havas komunan lingvon: Esperanto. Do ni uzu ĝin por komuniki kun la tuta mondo!

Kiu estas via mesaĝo al la mondo? [...]

Partoprenu nome de TEJO Ĝeneralan Asembleon de UNOY en Nederlando

La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO serĉas kandidatojn por partopreni la Ĝeneralan Asembleon de UNOY (United Network of Young Peacebuilders) en Nederlando!

Ni serĉas homojn kiuj: [...]

TEJO partoprenis eventon pri homaj rajtoj ĉe UN en Ĝenevo

La prezidanto de TEJO Joop Kieft kaj nia oficisto pri Eksteraj Rilatoj Spyros Papadatos partoprenis eventon pri homaj kaj junulaj rajtoj ĉe la Alta Komisaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj (UNHCHR) en Ĝenevo. Joop partoprenis ankaŭ laborgrupon de Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizo (ICMYO), Forumo Junulara Eŭropa (European Youth Forum) kaj UN (United Nations Human Rights). [...]



Leteroj de niaj legantoj



En la turka Stelo n-ro 48 mi aparte aprezis la desegnon pri libroj: libroj estas speguloj

fenestroj
pordoj
ŝtupoj
ktp

Tre inteligentaj kaj pravaj tiuj komparoj !

Roland Platteau el Francio



Karaj,
Mi elkore dankas al vi por la alsendaĵo de la ege brila Turka Stelo, kiu datrevenas!

Gratulon al ĉiuj!

Mi reciprokas la bondezirojn, karaj amikoj!

Feliĉan Kristnaskon! Pacan kaj prosperan Novjaron!

Maria Nazaré Laroca el Brazilo



Karaj,
Dankon pro via fidela, persista laboro por la Turka Stelo!

Raita Pyhälä (Saliko) el Finnlando



Karaj,

Mi ĵus aliris kaj tralegis la numeron 48 de la belega Turka Stelo. Vere agrabla, varia, instrua kaj amuza enhavo! Mi gratulas krome

pro la kvarjara regula aperigado. Longan vivon al tiu brila Stelo!

Paulo Sergio Viana el Brazilo



Hola karaj, gratulojn de mi kaj de Ilir Zhiti.

Bardhyl Selimi el Albanio



Karaj,

Mi trovis en du ret-revuoj (L'Ampiro kaj La Turka Stelo) artikoleon pri mia mikronovelo «Verŝajne». Mi sincere dankas la aŭtoron de

la artikolo pro lia afabla komento, sed la vorteto «ne» estis erare aldonita ĉe la fino, kio estigas la tuton sensignifa. La fino de la lasta frazo evidente estu «... ni verŝajne estus naskitaj.».

Christian Rivière el Francio

Nova libro de Julian Modest

ROMANO REALISMA KAJ PSIKOLOGIA

Recenzo

Julian Modest: NE SERĈU LA MURDISTON!

Originala romano en Esperanto, 2019. Eld.: Eldonejo

“Libera”, Belgio, Lode van de Velde:

lodchjo@yahoo.com

Dum la lastaj jaroj la konata Esperanto-verkisto Julian Modest verkis kelkajn krimromanojn: “Averto pri murdo” – 2018, “Murdo en la parko” – 2018, “Serenaj matenoj” – 2018, “Amo kaj malamo” – 2019.


Lia nova romano “Ne serĉu la murdiston!” denove estas krimromano, sed pere de la streĉa krimago Julian Modest talente priskribas la karakterojn de la herooj. La verkisto lumigas la plej kaŝitajn angulojn de iliaj animoj. “Ne serĉu la murdiston!” beletre montras socion, en kiu regas korupto, malĉasteco, hipokriteco, avido. Tie la mono estas gvidforto. La mono kaj potenco solvas eĉ la plej komplikajn kaj malhonestajn problemojn. La potenco, kiu kaŝas la krimagon, ordonas al la polico ne serĉi la murdiston.

“Ne serĉu la murdiston!” estas psikologia romano, kies aŭtoro starigas aktualajn demandojn: kia estas

la vera vivo, kiaj personoj kaŝiĝas malantaŭ la altaj ŝtataj postenoj, kia estas ilia moralo? Ĉu ili havas idealojn, ĉu ili honeste vivas aŭ estas hipokrituloj?

En la romano la rolantoj estas malmultaj, sed detale karakterizitaj.

La konflikto nestas en la animo de la ĉefrolulo, komisaro Kalojan Safirov, kiu ŝatas sian profesion, estas diligenta kaj honesta, sed li ne povas kontraŭstari al la kruela potenco. Nur la gejunuloj donas al li esperon je pli bona kaj pli morala vivo.



KIM

Viro sur la trajno (L'homme du train) - 2002



Fremdulo venas al malgranda urbo. Trajno. Mallongaj vidoj fluantaj ekster la trajna fenestro. Fono-muziko ne klare aŭdata. Granda viro, kiun ni vidos tra la tuta filmo, iom pli aĝa ol la meza aĝo, eltrajniĝas kun sia valizo, kvazaŭ identigita kun ĝi. Esence ĉio komenciĝis kun lia

intenco veni ĉi tien. Sed en la videbla parto de la filmo, ĉio komenciĝas, kiam li eniras apotekon kaj petas Aspirinon. Viro, kies kapo doloras, prenas la kuracilon kaj eliras. Promenas tra mallarĝaj stratoj. Li ne povas trovi hotelon por resti en ĉi tiu "stagnanta" urbo. La Aspirino estas akvosolvebla.

Manesquier, emerita literatura instruisto, invitas ĉi tiun fremdulon al sia domo por doni akvon kaj gastigi. Manesquier estas tiel parolema, kiel Milan – la granda viro - estas malmulte parolema kaj mistera. La direktoro ne daŭrigas ĉi tiun misteron longe. Kiam Milan retiriĝas al sia ĉambro post vespermanĝo kaj babilado, ni vidas du pafilojn, kiujn li eltiras el sia valizo kaj ni rimarkas, ke li venis ĉi tien por ia kontraŭleĝa laboro. Ĉu li estas dungita seria murdisto? Neeee!

En la sekvantaj scenoj, el liaj sekretaj konversacioj kun la aliaj membroj de la bando, ni komprenas, ke li venis por rabi bankon. Ĉiukaze, tio, kion Patrice Leconte volas rakonti al ni, ne estas mistera rakonto. Ĝi estas la historio de du malsamaj viroj kaj vivstiloj. "Mi dezirus esti vi" aŭ "Eble estus pli bone, se mi elektus vivi tiel, kiel vi."

En la komenco de la filmo, mi scivolemis, ĉu Manesquier estas gejo. Ĉi tiu soleca viro, kiu konstruis kastelon de libroj kaj memoroj - jes la kelketaĝa ŝtona domo, kiun li heredis el sia patrino, estas kvazaŭ malgranda kastelo - ĉu lia alproksimiĝo al Milan estas nur por amikeco? Ĉu ĉi tiu viro ne havas inajn amikojn? La direktoro respondas ĉi tiun demandon en la sekvantaj scenoj. Jes, li havas amikojn. Sed la plej grava problemo de ĉi tiu viro estas preterpasi ĉi tiun malfekundan kaj monotonan vivon en ĉi tiu eta urbo, serĉi pri renovigado de sia vivo, kiu estas plena je stabileco sed ankaŭ plena je deziro al aventuroj. La

subita alveno de ĉi tiu fremdulo ofertas al li ĉi tiun eblon.

Ĉi tiu simpatia maljunulo, kiu ekkonas vivon de la mezlernejo el kiu li emeritiĝis, kaj de libroj kaj filmoj, trovas la viron, li longe deziris esti, en Milan. Forta heroo. Eble soleca kaj vojaĝanta vakero. Manesquier faras elparolon de dialogoj el filmoj kaj faras imitojn. Li komprenas, ke Milan baldaŭ rabos bankon. Li ankaŭ volas rabi ĉi tiun bankon kaj iutage laŭte elparolas sian penson al Milan, kiam ili renkontiĝas en la banko.

Li dum sia tuta vivo volis fari ion frenezan sed li subpremis ĉi tiun deziron estante deca, bona familia knabo. Sed kio pri Milan? Ĉu li estas feliĉa pri sia vivo? Lia vivo, kiun Manesquier emas havi kaj ekscitiĝas pri, fakte lacigis lin. Tute male, li sopiras la establitan vivordon. Li ne certas, ke li volas rabi la bankon. Li esprimas sian heziton al sia malnova amiko el la bando. Ĉu la egoj de la viro, kiu loĝas en la grandega ŝtona domo kun ĝardeno, kaj de la "ago"-homo, kiu eliris el la trajno, estas alternaj? En la lasta sceno, kun la rigardoj kaj la sinsekvaj kvadratoj, Leconte tre bone rakontas tiun sopiron: "esti la alia."

Jean Rochefort, jam forpasinta granda aktoro, ankaŭ faris mirindan komponaĵon en iu alia bela filmo de la sama direktoro, en "La Edzo de Barbiro". Rochefort plenigas la internon de la kadro per siaj ironiaj kaj inteligentaj rigardoj. Johnny Hallyday, brila stelo de Rock muziko de sia tempo, tre bone taŭgas al sia rolo.

De tempo al tempo mi pensis, ke li aspektas kiel Charles Bronson en ĉi tiu filmo. Hallyday, kiun mi memoras de mia infanaĝo pro lia ŝtorma amo por Sylvie Vartan kaj lia raŭka voĉo, kaj lia juna, freneza bildo sur la podioj en la 70-aj jaroj, ĉi tie kontraŭe prezentas la rolon de digna kaj laca viro sukcese.

La duan fojon kiam mi spektis "La Viro Sur la Trajno" impresis min tiel multe, ke mi sentas min konservativa kaj mi ne volas spekti la sekvan version de Donald Sutherland, aktoro, kvankam kiun mi admiras. Se vi volas kompari ilin, kompreneble vi povas spekti ĝin. Sed mi neniam vidis, ke "dua versio" gustas same. Ĉu "Duoninsulo de Timo" (Cape Fear) estas escepto? Mi ne scias. Ĉar mi jam spektis la duan version :-)

Ne interrompu (Une heure de tranquillité) - 2014

Jen alia filmo de Patrice Leconte. Ĉi-foje komedio. Ĝi komenciĝas per muziko kun tre rapida ritmo kaj ekstera aspekto kompare al la peza etoso de la



Antikva helena saĝulo de la 6a jarcento a.K., iu Kleobulo (Κλεόβουλος) iam diris: “mezuro estas perfekta!”. Tiu diraĵo restis viva kaj valida ĝis nun kaj ĝi estas uzata de la nuntempaj Grekoj, kiel maksimumo montranta, ke ĉio en la vivo havas limojn, kiujn la homoj devas ne superi. Estas ja homoj, kiuj ne observas kiom ili devas la decan mezuron, estas ordinare distingindaj homoj, meritantaj aprobon, admiron, respekton, tamen, pro troa fiereco, aroganteco aŭ io alia, iam forgesas, ke ili nepre devas agi laŭ la mezuro de siaj fortoj kaj ebloj. Ili forgesas tion, ili superas la mezuron kaj pereas. Jes, ili pereas, ili detruigigas, ili neniigigas, ĉar la dioj, aŭ, pli bone, la naturaj reguloj, ne permesas tian deflankiĝon. Tial, mi rakontos hodiaŭ pri unu el la plej grandaj herooj de mia ŝatata mita mondo, mi skribos pri Belerofono.



Belerofono estis princo, li estis filo de Glaŭko (Γλαύκος), la reĝo de Korinto (Κόρινθος).

En la malmulto kion mi jam diris estas kaŝitaj du tre signifaj sekretoj. Unue mi malkaŝu, ke la unua nomo de Belerofono estis Hiponoo (Ιππόνοος). Li ricevis la nomon Belerofono post kiam li mortigis potencon kontraŭulon nomatan Belero (Βέλλερος). Ĉar en la helena lingvo la vorto “mortigo” estas “φόνος” (fonos), estis donita al la heroo la alnomo, kiu restis kiel ĉefa ties nomo, signifanta “mortiginto de Belero”. La dua sekreto estas, ke la vera patro de Belerofono estis ne Glaŭko, sed la dio de la maro, Pozidono (Ποσειδών). En tiuj epokoj, la grandaj dioj ofte deziregis virinojn mortemajn. En tiaj okazoj, ĉu malkaŝe, ĉu dole, sub formo de imagaĵo, fantomo aŭ io simila, la dioj ne hezitis kuniĝi kun elektitaj, ordinare tre belaj mortemulinoj. Eŭrinoma (Ευρυνόμη), la patrino de Belerofono, virino tre bela, vekis la amorpasion de Pozidono, do, mi ne scias ĉu kaŝe aŭ malkaŝe li kuniĝis kun ŝi kaj post tio estis naskita la heroo.

Mi, ja, malkaŝis la sekretojn de Belerofono, nun mi diru, ke malgraŭ sia dia deveno, li estis batita de la

sorto en tre juna aĝo. Li mortigis sian fraton! Li faris tion senintence, estis akcidento, hazarda, malfeliĉa okazaĵo, tamen estis peza krimo, kaj la kutimoj de la epoko en tiaj okazoj postulis la memekzilon de la kulpulo. Nu, Belerofono forlasis sian patrujon kaj rifuĝis en Argo (Άργος), ĉe la reĝo de tiu lando Prito (Πρόϊτος), kiu volonte lin akceptis kaj prenis sur sin la taskon purigi lin je la krimo. Kaj tiu purigado estis serio da ritoj, celantaj la satisfakcion de la peza peko, ritoj solene plenumitaj de nobla kaj pia patrono.

Belerofono, do, loĝis sufiĉe longe en la palaco de Prito, kie li estis trankvila kaj feliĉa. Tio daŭris ĝis kiam la edzino de Prito, Stenebia (Σθενέβοια), virino plezurama, mi diru eĉ voluptema, kompreneble ne fidela al sia edzo, eksentis ardan voluptan pasion al la bela gasto. Ŝi ne hezitis malkaŝi sian adultintencon kaj deziregon, tamen, Belerofono, kiu multe estimis kaj respektis Priton, ne favoris ŝian pasion, li tute klare rifuzis la allogan oferton, kaj tio, kompreneble, kolerigis la ofenditan virinon, kiu, plorante, diris al sia, verŝajne naiva, edzo, ke la fremda junulo ofende ŝin amindumis, eĉ li faris al ŝi malĉastajn proponojn.

Kiel ordinare okazas, la naiva edzo kredis ĉion, li indignis kontraŭ la sendanka gasto kaj en la komenco li decidis lin mortigi. Tamen, iom pli poste li pensis, ke estus granda peko kontraŭ la dioj, se li mem mortigus personon, al kiu li estis oferinta purigan azilon, do, li pensis pri ia intrigo kaj petis de la junulo, ke li faru al li amikan servon. Li, do, sendis Belerofonon al la malproksima Licio (Λυκία), por liveri al lia bopatro, lobato (Ιοβάτης), la reĝo de la lando, personan, sekretan kaj pro tio bone sigelitan mesaĝon. En tiu mesaĝo, Prito eksplikis ĉion kaj petis de sia bopatro, mortigi la alportanton.

lobato, kiu tuj komprenis, ke la junulo apartenas al nobla gento, ne volis mem mortigi lin, do, li bonakceptis lin, li ŝajnis ke li bezonas helpon de fidinda persono, kaj, pensante ke la junulo nepre malsukcesos, li komisiis al li liberigi la landon je granda danĝero. Tiu danĝero estis Ĥimero (Χίμαιρα), monstro, kiu voradis la brutojn, detruadis la kultivaĵaron kaj diskarnigis la homojn, kiuj provis tion malhelpi. La monstro havis kapon de leono kaj el la buŝo ĝi elĵetadis flamojn; ĝi havis korpon de grandega kapro kaj longan voston kiu finiĝis per serpenta kapo; ĝi havis longajn, hokajn ungojn kaj forton de centoj da viroj. Ĝi estis iu, nepriskribeble abomena kaj terura estaĵo!

Mi interrompu la rakontadon por diri, ke Pozidono,



la patro de Belerofono, kiu, kiel unu el la plej grandaj dioj, vidis kaj sciis ĉion, kiam vidis ke lia filo foriris de Argo, post tia maljusta akuzo, faris al li tre valoran donacon. Li donis al li Pegazon (Πήγασος) kaj tiu Pegazo estis belega, grand-korpa, blanka, flugilhava ĉevalo, tiu sama ĉevalo, kiu estis elsaltita el la kolo de Meduzo (Μέδουσα), la monstro kiun senkapigis la heroo Perseo (Περσεύς).

Kiam, do, Belerofono provis alproksimiĝi al Ĥimero, la monstro komencis elĵetadi flamojn kaj minace disetendi la serpent-kapan voston kaj la terurajn ungojn. La heroo, kiu vidis ke li ne povas de proksime alfronti la monstron, rajdis sur Pegazo kaj flugante super ĝi komencis ĵetadi sur ĝin siajn sagojn kaj lancojn. Eĉ tio ne estis facila, la terura monstro saltadis alten, ĝi elkraĉadis supren fajron, ĝi ululadis timege, tamen la sagoj kaj pik-stangoj de Belerofono falis sur ĝin sencese, tiele iom-post-iom la monstro perdadis fortojn, post longa rezisto ĝi falis, mortis!

Belerofono revenis al la palaco de Iobato, triumfe akompanata de multaj dankemaj vilaĝanoj. La reĝo klopodis kaŝi sian miron kaj admiron kaj tuj komisiis al la juna heroo marŝi, kun nur malmultaj kunuloj, kontraŭ la Solimoj (Σόλυμοι), mult-triba, tre sovaĝa kaj militama gento, malamika al Licio, kiun Iobato neniam povis venki. Belerofono ne atendis la malamikojn alveni, neatendite li atakis ilin sturme sur ilia kruta, monta tero, li surprizis ilin kaj kruele, senindulge batante, preskaŭ ekstermis ilin.

Ankoraŭfoje triumfe li revenis ĉe Iobato, kiu refoje miris, sed li komisiis al li novan ekspedicion, kontraŭ malamikaj triboj de tre danĝeraj, najbaraj amazonoj. Belerofono sam-maniere sturmis la temerarajn militistinojn, furioze batalis, tute venkis la senorde detiriĝintajn malamikinojn kaj revenis al Licio, kie la liberigita je tiom grandaj, daŭraj suferoj popolo akceptis lin pompe, entuziasme festante kaj laŭdante liajn grandajn sukcesojn.

Iobato estis en embaraso. Li komprenis, ke la juna heroo havis eksterordinaran militkapablon, li konstatis, ke la fremdulo estas sprita, sagaca, je ĉio lerta, do, li ne sciis kion li povus ankoraŭ fari por kontentigi la peton de sia ofendita bofilo. Li longe pensis kaj fine, por havi certan rezulton, li decidis mem organizi embuskon. Li, persone, elektis kvindek fidelulojn, virojn tre lertajn en la uzo de la armiloj kaj kaŝe ordonis ilin ataki surprize kaj mortigi Belerofonon, kiam li estos tute sola, en dezerta kampara loko. Ekzakte tio okazis; unu tagon, kiam Belerofono, laŭ sia kutimo, faris sian postmanĝan promenadon en dezerta, fora loko de la reĝa arbareto, sen armilaro, portante nur sian malpezan spadon, akceptis

neatenditan aropan atakon de multaj spertaj armitoj. Sekvis batalo kruela, longa, post kiu restis sur la tereno kvindek mortintoj. La malpeza spado, la kuraĝo, la forto kaj la batal-lerteco de Belerofono pruviĝis sufiĉaj.



Kiam la heroo revenis al la palaco tute nevundita, eĉ freŝa, nelaca kaj bonhumora, Iobato komprenis ke lia gasto ĝuas protekton dian. Pro tio, sed ankaŭ ĉar intertempe li estis estiminta la reĝdecan edukadon, la eksterordinaran kuraĝon, la bonan karakteron kaj konduton de la junulo, ne nur forgesis la peton de Prito, sed li oferis al Belerofono la manon de sia dua filino Filonoa (Φιλονόη) kaj la duonon de sia reĝpovo.

Tiele Belerofono akiris belegan, junan edzinon, la duonon de la trono de lando granda kaj potenca, netakseblan posedaĵaron kaj la amon de la tuta popolo, kiu vidis lin kiel solan reganton de la lando.

Sekvis feliĉaj jaroj, kiuj, krom ĉio alia, venigis al Belerofono tri infanojn; li akiris du filojn kaj unu filinon, Laodamian (Λαοδάμεια), kiun mi aparte mencias, ĉar, jarojn poste, ŝi naskis filon de Zeŭso (Ζεὺς), la grandan heroon kaj gloran reĝon de Licio Sarpedonon (Σαρπηδῶν).

Belerofono havis ĉion kion ĉiu viro sur la tuta tero povus deziri!

En tiu ĉi punkto mi devas denove iom paroli pri la limoj de la vivado, pri la mezuro, kiun menciis tiu Kleobulo, ĉar Belerofono, kiu havis ĉion, deziris ankoraŭ pli multon!

Post la unuaj jaroj de sia reĝeco kaj familia harmonio, li komencis enui pro stranga senintereso pri ĉio ajn. La amo kaj daŭra prizorgo de la edzino, la amo de la gefiloj, de la kunuloj, de la amikoj, de la tuta popolo ne sufiĉis, nenio el ĉio tio ĉi tuŝis Belerofonon, kiu pli kaj pli multe malproksimiĝis de la aktualeco de sia vivado. Sola plezura lia okupiĝo estis la rajdado sur Pegazo. Rajdirante super la tero iom-post-iome li perdadis la kapablon distingi la faktecon, la realecon de la objektoj, li komencis vivi en daŭra revado pri io ankoraŭa, pri io pli multa ol la homaĵoj. Rajdante sur



Pegazo li deziris flugi pli kaj pli altan, nu tion li faris kaj la brile bela ĉevalo ĉiam obeis sian mastron, ĝi flugis foren, altan.

Tio okazis, ĝis kiam Belerofono donis sian lastan, ekstreman ordonon; li petis de Pegazo flugi sur Olimpon (Όλυμπος), sur la sanktan monton, kie estas la restadejo de la grandaj olimpaj dioj!

Ekaŭdinte tion la obeema besto subite furioziĝis,

perforte eksaltis, eksvingiĝis, ekĵetis de sur sia dorso, defaligis la arogantan rajdanton kaj flugis foren.

Nia heroo falis sur la teron, sur la mondon kiun li perfidis. Lia aroganteco igis lin forgesi sian morteman naturon, li puŝis lin deziri ion trans la homaj limoj kaj tio estis kaj ĉiam estas tre severe punata.

Belerofono, blinda, lama, preskaŭ freneza, mizera, malfeliĉa, vagadis sencele kaj senĉese, malproksime de la homoj, ĝis la fino de sia vivo.

Pegazo prenis lokon antaŭ la majesta ĉaro de la reĝo de la dioj, krome li iĝis neestingebla stelo sur la senlima ĉielo kaj restas por ĉiam simbolo de la plej valora homa talento, ĝi estas simbolo de la poezia inspiro!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Fonto: GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

Blogo de eksedzo

-- el la blaga blogo

"ni mem kutime agas kaj reagis laŭ la aŭguroj, kiujn ni aŭdas"

Politikisto el mia lando iufoje diris ke "prognozi estas malfacila afero, ĉefe, kiam temas pri prognozo de la estonteco". Tiu stultulo tutcerte pravis, sed fakte ekzistas du grandaj tipoj de prognozo: la malfacila kaj la multe pli malfacila prognozo. Tion klarigas fakuloj per la teorio de la du niveloj de ĥaoso. La vetero estas la tipa ekzemplo de la unua nivelo de ĥaoso, ĉar kiam la meteologo anoncas venontsemajnan pluvon, tiu aserto eble pravos, eble ne, sed ĝi mem tute ne kapablas ŝanĝi la venontsemajnajn veterajn kondiĉojn.



Efektive, buraskoj kaj kontraŭciklonoj agas tute sendepende de la veteraj mapoj kaj fizikistaj kalkuloj. Tamen,

kiam ekonomikisto antaŭdiras ekonomian krizon aŭ kiam politika enketo disvastiĝas amaskomunikile, tio ja kapablas modifi la homan konduton. Temas pri la dua nivelo de ĥaoso. Do, anonci, ke la ekonomio bone aŭ malbone statos venontjare, aŭ aŭguri ke iu politika partio venkos en la venontaj balotadoj, povas kaŭzi neplanitajn reagojn, kiuj povas vere ŝanĝi la rezulton se tiu prognozo ne okazintus. Komplika afero, ĉu ne?

La plej lertaj legantoj certe tuj rimarkis, ke la dua

nivelo de ĥaoso aperas kiam la homa konduto havas gravan rolon. Ni ĉiuj akceptas tion, ĉar ni mem kutime agas kaj reagis laŭ la aŭguroj, kiujn ni aŭdas. Interesa apartaĵo estas la memplenumitaj profetaĵoj: mia najbaro, ekzemple, komencis antaŭvidi ke li baldaŭ mortos, kaj tio tiel forte afekciis lin, ke li ne kapablis reagi. Li perdis la iluzion, li preskaŭ ne manĝis, kaj finfine li pravis kaj mortis.

Simila danĝera afero estas la intergeedzaj prognozoj: dum la lastaj jaroj, mia edzino ofte aŭgure diradis al mi: "mi forigos vin el la hejmo!", aŭ "iun tagon vi trovos vian valizon ĉe la pordo", seke aldonante: "ekstere!" Tamen finfine, antaŭ ol tio okazis, estis mi mem kiu fuĝis. Do, mia (jam eks)edzino tute ne konante tiun duan nivelon de ĥaoso, neniam pensis ke mi povus reagi tiel. Nuntempe mi loĝas ĉe alia virino, kiu, carpe-dieme**, tute ne ŝatas prognozi ion ajn, ĉefe kiam temas pri prognozo de la estonteco.

** "Carpe diem!" - latina citaĵo el Horaco. "Pluku, t.e.ĝuu/ ekspluatu, la tagon! Kiom eble malplej konfidu al la morgaŭo."

de **Viktoro SOLÉ**, Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", revuo Kontakto, #272, 2016:2, p.18

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)
(daŭrigata)

Karinovka... La granda domo... ties grandegaj fenestroj, tra kiuj flue eniris la aero kaj la lumo... la terasoj, la salonoj, la galerioj, kie lokiĝis kvindek muzikistoj dum la festvesperoj...

Ŝi memoris la kristnaskan nokton, kiam foriris Cirilo kaj Jurij... Ŝi kredis ankoraŭ aŭdi la valson, kiun oni ludis tiun nokton...

Jam pasis kvar jaroj...

Ŝi imagis la kolonojn kovritajn de glacio flagrantajn en la lunlumo.

"Se mi ne estus tiel maljuna" ŝi pensis, "mi volonte farus la vojaĝon..."

Sed tio ne estus la sama afero...

La neĝon... Kiam ŝi ekvidos ĝin fali, ĉio finiĝos... Ŝi forgesos ĉion, ŝi kuŝiĝos kaj fermos la okulojn por ĉiam...

"Ĉu mi vivos ĝis tiam...?" ŝi murmuris.

Senkonscie, ŝi ekprenis la vestaĵojn lasitajn sur la seĝoj kaj ekfaldis ilin...

De kelka tempo, ŝi kredis vidi ĉie konstantan etetan polvon; tiu falis de la plafono kaj kovris la objektojn. Tio komenciĝis en la aŭtuno, kiam noktiĝis pli frue, kaj oni prokrastis la momenton por lumigi la lampojn por ne konsumi tro da elektro.

Ŝi senĉese viŝis kaj skuis la ŝtofojn; la polvo leviĝis sed tuj refalis pli malproksimen, kiel malpeza cindro.

Ŝi levprenis la vestaĵojn, brosis ilin, grumblante kun esprimo de stuporo kaj turmento.

"Kio estas tio? Nu, kio tio estas do?"

Subite, ŝi ĉesis kaj rigardis ĉirkaŭ si.

Dum momento, ŝi ne plu komprenis, kial ŝi estas tie, vagante en tiuj mallarĝaj ĉambroj.

Ŝi levis la manojn al sia brusto kaj suspiris.

Estis varme kaj premaere, kaj, escepte pro la festnokto, la hejtiloj brulis ankoraŭ kaj eligis odoron de freŝa farbo. Ŝi volis estingi ilin, sed ŝi neniam sukcesis kompreni, kiel oni funkciigas ilin. Kelkan tempon, ŝi vane turnis la klinkon kaj fine lasis ĝin.

Ŝi refoje malfermis la fenestron.

La apartamento ĉe la alia flanko de la korto, estis lumigata kaj projekciis ortangulon de vigla lumo en la

ĉambron.

"Ĉe ni..." ŝi imagis, "nun ĉe ni... la arbaro frostiĝis."



Ŝi fermis la okulojn, revidis kun eksterordinara precizeco la profundan neĝon, la fajrojn de la vilaĝo, kiuj briletis malproksime, kaj la riveron ĉe la parkorando, flagrantan kaj malmolan kiel fero.

Ŝi restis senmova, premita kontraŭ la fenestro, tirante per kutima gesto sian ŝalon sur la misaranĝitaj hartufetoj.

Falis malofta kaj varmeta pluveto. La brilantaj gutoj, pelataj de subitaj ventblovoj, malsekigis ŝian vizaĝon. Ŝi tremetis, pli premis kontraŭ sin la flankojn de sia malnova nigra ŝalo.

Ŝiaj oreloj zumis, foje ŝajnis transiritaj de fortega bruoj, kiel tiu de batanta frapilo de sonorilo. Doloris ŝia kapo, ŝia tuta korpo.

Ŝi eliris el la salono, eniris por enlitiĝo en sian etan ĉambron en la fundo de l' koridoro.

Antaŭ ol enlitiĝi, ŝi genuiĝis, diris siajn preĝojn. Ŝi krucosignis sin, tuŝis la pargeton per sia klinita frunto, kiel ĉiuvespere. Sed tiun nokton la paroloj konfuziĝis sur ŝiaj lipoj. Ŝi haltis, fikse rigardis la etan flamon, piede de l' ikono kun speco de stuporo.

Ŝi enlitiĝis kaj fermis la okulojn sed ne sukcesis endormiĝi.

Kontraŭvole ŝi aŭskultis la krakojn de la mebloj, la bruon de la horloĝo en la manĝoĉambro, kvazaŭ homa suspiro, kiu aŭdiĝis antaŭ la horobatoj en la silento. Krom tio, super kaj sub ŝi, ĉiuj gramofonoj samtempe ludis dum tiu kristnaska festeno.

Homoj supren- kaj malsupreniris la ŝtuparon, trairis la korton, eliris.

Ĉiumomente aŭdiĝis tiu krio: "La kordonon*, mi petas!", kaj la obtuza eĥo de la fermanta aŭ malfermanta pordego kaj paŝoj, kiuj malproksimiĝis sur la strato.

Rapide pasis taksioj.

Raŭka voĉo vokis la pordiston en la korto.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

Hirundo konstruas neston Per daŭra ŝmirado de koto

En la sudo de la Anavarza ebenaĵo pasas la rivero Ĝejhan. La rivero, de la monto Hemite ĝis la rokoj de Anavarza, fluas suben, preskaŭ rekte, sen gravaj faldaĵoj. En kelkaj lokoj la akvo fosas la teron profunde. La tero, kies subon elfosas la akvo, kelkfoje disfalas kun bruo sur la akvon. En kelkaj punktoj la krutaĵoj, ŝajne tranĉitaj per glavo, pro la disfalado de tero fariĝis dento-formaj, kaj sub ili en la bordo de la rivero formiĝis golfetoj plenaj je sablo. Tamen en aliaj partoj la rivero alportis kaj disvastigis ŝtonetojn kaj pro tio en ĉi tiuj partoj la rivero etendiĝas vaste. Ĉi tie, en la helaj partoj de la malprofunda akvo, miloj da karmo-fiŝoj, trempitaj en lumo, unu postsekvante la alian, naĝas glite kaj onde tien kaj ĉi tien. Plue en la bordo de la rivero troviĝas etaj kanejoj. En tiuj kanejoj vagadas multaj grandetaj verdaj ranoj, kaj nubkoloraj ardeoj kun longaj koloj.

Tie kaj ĉi tie, tamariskoj, vitacoj, salikarboj, rubusarbustoj, domarbustoj kaj aliaj plantoj interplektiĝas en la riverbordo. Verdaj abeloj, ruĝaj azenabeloj, bido-abeloj, bluj aĉaj abeloj kreskigas siajn mielĉelarojn ĉi tie en la varmeco. Pro la zumado de abeloj, tiuj fekundaj partoj de la bordo daŭre bruas. Kaj poste venas la bluj alcionoj, kies longaj bekoj ŝajnas al la malmola dorsa ŝelo de insektoj, kaj ili skulptadas la krutaĵojn, malfermante truojn en ili por konstrui siajn nestojn, en la profundeco de la grundo. De la monto Hemite ĝis la kastelo de Anavarza, en ĉi tiu flanko de la rivero, troviĝas la vilaĝoj Hemite, Orhaniĵe, Selimiĵe, Endel, Kesikkeli. Ĉar la rivero de tempo al tempo ŝanĝiĝas sian bedon, ĉi tiuj vilaĝoj de tempo al tempo malproksimiĝas de la akvo. La akvo do, foriras, tamen de tempo al tempo ĝi alproksimiĝas kaj eniras eĉ en la domojn. Oni diras, ke dum egaj inundoj eĉ foje la akvo forprenis duonon de tiuj vilaĝoj.

La rivero Ĝejhan apud Anavarza kastelo formas vastan lageton. La fundamenton de Anavarza kastelo lavas la akvo de ĉi tiu lageto, kaj ĉi tie, ties akvoj daŭre turniĝas. En centoj da punktoj aperas kirlaĵoj ŝajne al malgrandaj ciklonoj, kiuj iufoje ŝvelas sed aliĵoj malŝvelas, kaj kies rapideco turnigas la kapon de homo kaj formiĝas ŝaŭmoj sur la akvo. Branĉeto kiu falas en ĉi tiu lageto daŭre turniĝas kaj saltas de kirlaĵo al kirlaĵo sensukcese malproksimiĝi. Ĉu falas iu papilieto en la akvon, aŭ ĉu centoj da papilietoj flugas super la surfaco de la akvo, silurfiŝoj, eĉ pli grandaj ol homa korpo, kun siaj vastaj buŝoj kaj lipharoj, malfermas la buŝon kaj kuratakas en la surfakon. Ili

ĉiufoje forkaptas aron da papilietoj kaj plonĝas reen en la akvon. En ĉi tiu momento sur la akvo formiĝas verda ŝaŭmo.

La rokoj de Anavarza kastelo ŝajnas al ŝipo, kiu etendiĝas de nordo al sudo, sur kies ferdeko staras la antikvaj restaĵoj kaj la kastelo. La ŝipo de Anavarza ĉiam flosas malrapide sur trankvila maro sed tamen ĝi neniam balanciĝas.

Ĉu ni surgrimpos la noblajn, krutajn, purpurkolorajn rokojn de la Anavarza, kaj ni turnos nin al la oriento, ni unue vidos la monton Hemite kun sia fumplena pinto. Se jam tagiĝis kaj la fumo leviĝis pli supren al la ĉielo, sur ĝia supraĵo ni eĉ povos vidi la globarbojn kaj ankaŭ la tombejon de iu sanktulo. Post la monto Hemite la montopintoj platiĝas. La terpeco ĉirkaŭ Bozkujju estas malfekunda kaj nuda. Ĝi estas griza grundo, kiu el malproksime vidiĝas plenblanka. Ĉe la vilaĝo Ĝigĝik la grundo ŝanĝiĝas, nigriĝas, komenciĝas la verdeco de la arbaro, kaj ties ĉirkaŭaĵoj pleniĝas je floroj. En la mezo de kampoj apud Ĝigĝik vilaĝo troviĝas Bizanca mozaiko. Ĉi tiu loko, kiel sovaĝa granda ĝardeno, floriĝas en la mezo de la ebenaĵo.

En la nordo troviĝas Kadirli vilaĝo, kaj en Kadirli la monteto Sulemiŝ... En la supraĵo de Sulemiŝ troviĝas mirto-arbustoj, kun siaj pezaj odoroj. Ankaŭ la monteto Sulemiŝ estas nuda, tamen ĝi ĉiam estas verda. En la fundo de ĝiaj baskoj la rivereto Savrun bolante malsupreniras al la ebenaĵo.

En la sudokcidenta parto de Anavarza ebenaĵo troviĝas la vojo al Kozan... Tie la rojo Sumbas fortranĉas la vojon al Kozan kaj atingas la rokojn de Anavarza. En la alia flanko de Sumbas, en la okcidenta flanko de Anavarza kastelo, troviĝas Haĝilar vilaĝo... kaj preterpasante ĝin ni atingas Aslanli vilaĝon... En ĉi tiu vilaĝo loĝas la restantoj de Lek Kurdoj, kiujn la olduloj de la vilaĝo nomas "sovaĝaj birdoj". Pli poste troviĝas Dumlukale kastelo kiu aspektas forfluganta al la Mediteraneo. Dumlukale ĉiam estas mergita en fumo. En la varmeco la rokoj sub la kastelo ekfumas.

Jen ĉi tiu estas la fekunda ebenaĵo de Anavarza. Kaj en ties centro etendiĝas, la malhela, zumanta, senlima lago, kie birdoj ne flugas kaj serpentoj ne siblas. Ĉi tiu estas la marĉo de Akĉasaz plena je kanejoj. En ĝiaj bordoj troviĝas la vilaĝoj de Turkmenoj kun domoj konstruitaj el fragmitoj kaj kanoj... La marĉo komenciĝas sude el la punkto, kie rivereto Savrun enbrakumiĝas kun rivero Ĝejhan kaj finiĝas en la nordo ĝuste apud la vilaĝo Vajvaj.



La fekunda ebenaĵo de Anavarza donas produkton trifoje en la jaro. Ĉi tiu grundo, kiu estas nigra, olea, trankvila kaj fruktodona, en ĉiu alia tago de la jaro elŝprucigas diversajn plantojn. Ĉiuj plantoj estas grandkorpaj. Ili atingas duoblan, trioblan eĉ kvinoblan grandecon de la sama planto, kiu kreskas en aliaj terpecoj. Eĉ la koloroj de la floroj, herboj kaj arboj estas alia. La verdo estas kristalverda, la flavo estas sukkena. La ruĝo brilas kun ardaĵoj fajreroj, la bluo estas milfoje blua. La insektoj, la formikoj, la papilioj, la flugiloj de birdoj, ĝiaj ŝeloj, ĝiaj dorsoj, buntas en nenie alie viditaj, magiaj, milunuaj koloroj. La insektoj, papilioj, birdoj, akridoj ŝtormas en la ebenaĵo. Kelkfoje vidiĝas ŝtormo de papilioj kiuj ĵetiĝas de loko al loko. La arboj, floroj, herboj, ŝtonoj, grundo kaj ĉielo, ĉio pleniĝas je papilioj. Flavaj, ruĝaj, verdaj, bluaj, blankaj, ĉiu en la grandeco de birdo, la papilioj, kvazaŭ tornado svarmas, turniĝas, glitas, ondiĝas, fluas ĉielen, disvastiĝas, surteriĝas en la kampo, kaj tiam subite ili ekflugas denove, ŝajne al ondoj, kiuj faras la cirkaŭaĵon iel magia, iel miriga, tute malsimila, neatingeblan lokon. Alifoje, dikaj, ruĝaj formikoj, sur ĝiaj altaj kruroj galope trapasas la ebenaĵon de fino ĝis fino en granda rapideco. Kaj eĉ alifoje la vento blovas plene je bido-abeloj.

La lampiroj kaj lucioloj de la ebenaĵo estas tre grandaj. Akĉasaz nokte en la ebenaĵo aperas brodita plena je steloj. Ĝis mateniĝo herboj, arboj, floroj, folioj, branĉoj radiadas lumon. Kaj ili estas tro multaj. Ili flugas unu sur la alia. Oni ŝajne observas ŝtormon de stellumoj. La steloj de la ĉielo kuniĝas, intermiksiĝas kun la steloj de la ebenaĵo.

Ĉio svarmas, la verdaj muŝoj, la akridoj kun la malmola ŝelo en ĝiaj dorsoj, la lumantaj kaj fajrantaj insektoj, ĉiuj blovas en la sama ŝtormo. En la ebenaĵo de Anavarza, ĉio, herboj, arboj, insektoj, birdoj, bestoj estas en senfina pariĝo kaj fekundiĝo. La estaĵoj estas tute aliaj en la ebenaĵo de Anavarza. Ili estas estaĵoj de fekunda, sana, luma, magia mondo.

La bordoj de Akĉasaz, kaj ankaŭ ĝis sufiĉe al la interno, estas plena je narcisoj. Kaj la narcisoj kreskas ĝis la homa ventro. Kaj ili floras en la grandeco de rozoj. Ronde la bordo de la marĉo estas plena je kampoj de narcisoj. Kaj jen pro tio la odoron de la marĉo oni ne rekonas. El la mola grundo eliĝas malrapide kaj malpeze la odoro de narcisoj kaj tiu odoro aromigas la varmecon, ŝtonojn, herbojn, arbojn, insektojn kaj eĉ homojn. Printempe en la ebenaĵo de Anavarza ĉio odoras muŝo, insekto, lupo, birdo, narciso. Tage sub la varma suno la odoro de narciso iomete peziĝas.


Printempe la loĝantoj de Akĉasaz ebriiĝas, ilia kapo turniĝas, ŝanceliĝas. En la ebenaĵo de Anavarza

ĉiuj estaĵoj, birdoj, lupoj sentas kapturiniĝon.

verkis **Yaŝar Kemal** * el Turkio

***** Dua premio en branĉo prozo ĉe la Tradukkonkurso "Lucija Borĉić 2019" de la Kroatia Esperantista Unuiĝo *****

*** Yaŝar Kemal (Yaŝar Kemal)** estas la plumnomo de Kemal Sadik Gokĉeli. Li naskiĝis la 6-an de oktobro 1923 en vilaĝo Gokĉedam (proksime al Adana urbo), dum ankoraŭ en la Otomana Imperio, kaj mortis la 28-an de februaro 2015 en Istanbulo. Li estis turka-kurda prozisto, poeto kaj defendanto de homrajtoj. Plurfoje li estis nomumita al la literatura Nobel-premio. Li estis aktivulo favore al la kreo de sendependa Kurdistan. Oni konsideras lin unu el la plej gravaj nuntempaj turkaj verkistoj. Lia romano "Maldika Memedo" (Ince Memed) estis tradukita en pli ol 40 lingvojn.



FROSTO

Sur fenestro de balkono
Briletas nun glacifloro.
Aŭdas mi beketadon
De paru' – ĝi frandas lardon.

Lardopeco vivosava
Estas en la mond' malvarma.
Eta vivo vivi volas,
Malmulton ĝi nur bezonas.

Lardopeco ja troviĝas,
Eĉ se oni ne tro riĉas.
La viv' al ni ambaŭ karas,
Etan vivon do, mi savas.


Kiam venos la printempo,
Ĝojigos min birda pepo.
Espereble ni ĝisvivos,
Kaj printempe nin revidos.



verkis kaj sendis **Lenke Szász** el Rumanio

Karaj amikoj, ĉu ia rilato povas esti inter Esperanto kaj fobioj?

Ĉar ekde mi lernis Esperanton mi rimarkis la ekaperon de stranga fobio. Mi ne precize scias kiel traduki tiun, angle oni diras "anatidaephobia", tial mi simple diros "anasofobion". Mi timas, ke anaso ĉiam estas observanta min, ekzemple, nun, dum mi skribas al vi per mia komputilo, mi estas konvinkita, ke ie en mia ĉambro anaso spionas min. Kiam mi duŝas, sendube anaso rigardadas min tra la serurtruo. Kiam mi autobuse iras al mia laborloko, malantaŭe mi sentas sur mi ĝiajn okulojn. Kaj la simptomoj plimalboniĝas kiam mi legas libron de Claude Piron.



Kion mi povas fari, miaj karaj amikoj? Mi ne volas rezigni Esperanton, kiu certe estas la kaŭzo de mia fobio, sed la teruro daŭre pligrandiĝas!

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (40)

DUA PARTO - LA VIVO

65



Tiuj, kiuj en malnovaj tempoj estis kapablaj en la agado laŭ la TAŬO, ne faris tion per klerigo de la popolo, sed per tio, ke ili tenis la popolon malklera. Ke la popolo malfacile gvideblas, havas la kaŭzon, ke ĝi scias tro multe.

Tial tiu, kiu per sciado gvidas la regnon, prirabas la regnon.

Tiu, kiu ne gvidas ĝin per sciado, feliĉigas la regnon.

Tiu, kiu scias ambaŭ aferojn, havas idealon.

Ĉiam koni idealon estas kaŝita VIVO.

Kaŝita VIVO estas profunda, vaste efika,

alia ol ĉiuj aĵoj;

sed laste ĝi efikas kaj kaŭzas la grandan sukcesadon.

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Kaŝita VIVO estas profunda, vaste efika, alia ol ĉiuj aĵoj;

La mistera Virto estas tre profunda kaj longedaŭra.“

En la originalo la vortoj „fan“ (fonetike signifas „mala, kontraŭa“, sed ne „alia“ Vd. de Wang Chongfang:

„Ĝi estas kontraŭa al la naturo de konkretaj aferoj,“

Rimarkoj de Cezar

Ŝajnas al mi, ke tio eble estas parte falsita ĉapitro, kiun Laocio ne vere verkis tiel. En aliaj ĉapitroj Laocio atakas la hipokritecon de artistoj kaj de saĝuloj, ankaŭ troigitajn lertojn

kaj sciojn, sed ne la saĝecon mem. Alia kaŭzo eble estas, ke oni iel „devigis“ la majstron spite al pli bona scio skribi tiun ĉapitron, kvankam Laocio certe sciis ĝin pli bone.

Nu, ni havas ankaŭ tiun „problemeton“, ke ni rigardas Laocion el multe pli moderna perspektivo, jam tra la okulvitroj de la epoko de l' klerigo en Eŭropo. Tial tiu ĉi ĉapitro kun obskuraj imagoj estas eĉ pli suspekta al ni. Sed ni ne forgesu, ke Laocio ne povis koni la epokon de l' klerigo, li vivis en tute alia tempo, en kiu eble ankoraŭ neniu krom Konfucio laŭsence parolis publike pri tio, ke la edukiteco de la popolo estas decida mezurilo por la grado de la civiliziteco de tuta popolo. Tial ne plaĉas al mi, ke Rikardo Vilhelmo tradukas helpe de la vorto „klerigo“. Tiu nocio ne ekzistis en la tempo de Laocio. Oni ne subŝovu al teksto fonon, kiun ĝi ne povis havi ankoraŭ.

Komento de Wang Chongfang

„Tiu ĉi ĉapitro proponas, ke oni ne devas regi la regnon per „saĝeco“. Laŭ Laŭzi, regi la regnon per saĝeco estas por la regno katastrofo; kontraŭe, regi la regnon ne per saĝeco kaj lasi la popolon en senklereco estas por la regno feliĉo. Tio faras la impreson, ke Laŭzi kvazaŭ estas por la politiko de obskurantismo, sed efektive ne estas tiel. En la ĉapitro 18 Laŭzi skribas: „Kiam inteligenteco kaj saĝeco aperas, / Granda hipokriteco ilin sekvas.“ Tio montras, ke en efektiveco Laŭzi kontraŭstaras ne al saĝeco mem, sed al hipokriteco kaj artifikiteco. La ideala socio, laŭ Laŭzi, devus esti tia, en kia la reganto kaj liaj regatoj ne plu uzus „saĝecon“ kaj ambaŭ revenus al simplanimeco, kiel priskribite en la lasta parto de la ĉapitro 57.“

(daŭrigota)

Franco KAFKO (Franz Kafka) *



LA VERDIKTO

Historio de Franco Kafka
Por fraŭlino Felice B.

Estis dimanĉa antaŭtagmezo dum la plej bela printempo. Georgo Bendemano, juna komercisto, sidis en sia privata ĉambro en la dua etaĝo de iu el la malaltaj, leĝere konstruitaj domoj, kiuj sin etendis laŭ la rivero en longa vico, malsamaj preskaŭ nur per siaj alto kaj koloro. Li ĵus finis leteron al amiko eljuneca troviĝanta en eksterlando; fermis ĝin lude malrapide kaj poste, la kubuton apoge sur la skribotablo, rigardis tra la fenestro al la rivero, la ponto kaj la altejoj ĉe la alia bordo kun ilia delikata verdec.

Li meditis pri tio, kiel tiu amiko, malkontenta pri sia hejma avanco, jam antaŭ jaroj estis kvazaŭ fuĝinta al Ruslando. Nun li havis negocon en Peterburgo, kiu komence estis tre bone evoluinta, sed jam delonge ŝajnis stagni, kiel la amiko plendis ĉe siaj vizitoj maloftiĝantaj. Tiel li senutile trolacigis sin en fremdlando, la fremdeca plenbarbo apenaŭ kaŝis la bone el la infanaj jaroj konatan vizaĝon, kies flava haŭtkoloro ŝajnis indiki disvolviĝantan malsanon.

Laŭ siaj rakontoj li ne havis verajn rilatojn kun la tiea kolonio de siaj samlandanoj, sed ankaŭ preskaŭ neniun socian komunikadon kun la enlandaj familioj, kaj tiel akomodigis al definitiva fraŭla vivo.

Kion skribi al tia homo, kiu evidente mistrafis la ĝustan vojon; oni povis lin bedaŭri, sed ne helpi. Ĉu doni al li la konsilon rehejmenigi, do siajn ekzistrimedojn translokigi ĉi tien, revivigi ĉiujn malnovajn amikecajn rilatojn - kion ja nenio melhelpus - kaj cetere fidi al la helpo de la amikoj? Sed tio signifus nenion alian ol samtempe al li diri - ju pli

indulge, des pli afliktante - ke liaj ĝisnunaj provoj estis malprosperaj, ke li fine delasu ilin, ke li devas reveni kaj, kiel por ĉiam revenintan, lasi sin de ĉiuj grandokule primiri; ke nur liaj amikoj ion komprenas kaj ke li estas olda infano, kiu devas simple sekvi la sukcesajn, hejme restintajn amikojn. Kaj krome ĉu oni povus esti certa, ke tiu tuta turmento tiel al li farota estos ankaŭ utila? Eble oni eĉ ne sukcesus lin hejmenigi - li diris ja mem, ke li ne plu komprenas la cirkonstancojn en la hejmlando - kaj tiel li restus malgraŭ ĉio en sia fremdejo, amarigita de la konsiloj, kaj al la amikoj pluan pecon fremdigita. Sed se li efektive sekvus la konsilon kaj troviĝus deprimita - kompreneble ne intence, sed de la faktoj -, ne kapabla orientiĝi, nek inter siaj amikoj, nek ekster ili, suferus je hontiĝo, kaj nun efektive ne havus plu hejmlandon nek amikojn, ĉu tiam ne estus pli bone por li, ke li restu en la fremdo, tia kia li estis? Konsidere tion, ĉu vere oni povus konjekti, ke li ĉi tie estus iel sukcesonta?

Pro tiuj kaŭzoj, se oni entute volis daŭrigi la leteran rilaton, oni ne povis al li komuniki iajn esencajn informojn, kiajn oni senhezite farus eĉ al la plej malproksimaj konatoj. Nun jam de tri jaroj la amiko ne venis hejmen kaj klarigis tion tre preterpase per la malcerteco de la politikaj kondiĉoj en Rusujo, laŭ tio ne permesantaj eĉ la plej mallongan foreston de malgranda negociulo, dum centmil Rusoj trankvile vagadis tra la mondo. Aliflanke, dum tiuj tri jaroj ĝuste por Georgo multo ŝanĝiĝis. Pri la morto de lia patrino okazinta antaŭ ĉirkaŭ du jaroj kaj de kiam Georgo kun sia maljuna patro vivis en komuna mastrumado - pri tio la amiko ja ankoraŭ sciiĝis, li esprimis sian kondolencon letere kun iom da sekeco, kaŭzita certe nur de la fakto, ke la funebro pri tia okazo fariĝas neimagebla en la fremdo. De tiu tempo Georgo alfrontis, kiel ĉion alian, ankaŭ sian negocon kun pli granda decidemo. Eble lia patro, dum la vivo de lia patrino - ĉar li volis valorigi nur sian propran opinion -, lin malhelpis je vera propra agado; eble la patro, ekde la morto de la patrino, malgraŭ ke li daŭre laboris en la negoco, fariĝis pli retenigema, eble - eĉ tre verŝajne - ludis feliĉaj hazardoj multe pli gravan rolon; ĉiukaze la negoco dum tiuj jaroj evoluis tute senatendite, la dungitaron oni devis duobligi, la spezo estis kvinobliĝinta, plua progreso sendube estontis.

Sed la amiko sciis tute nenion pri tiu ŝanĝo. Antaŭe, la lastan fojon eble okaze de tiu kondolenco, li volis persvadi Georgon al elmigrado al Ruslando kaj



esprimis sin longe pri la ekspektoj ekzistantaj ĝuste por la negoca branĉo de Georgo en Peterburgo. La ciferoj estis neniom kompare al la amplekso, kiun la negoco de Georgo nun estis alpreninta. Sed Georgo tute ne estis eminta skribi al sia amiko pri siaj negocaj sukcesoj, kaj se li nun postokaze farintus tion, tio havus vere strangan aspekton.

Tial Georgo kontentiĝis, skribi al la amiko ĉiam nur pri sensignifaj okazoj, kiaj ili memore senorde amasiĝas, kiam oni pripensas dum trankvila dimanĉo. Li volis nenion alian ol lasi senĝenata la bildon, kiun la amiko, dum la longa intertempo al si certe estis farinta pri sia hejmurbo kaj je kiu li rezigne estis kontentiĝinta. Tial okazis al Georgo, ke li anoncis la fianĉiĝon de iu sensignifa homo kun same sensignifa knabino trifoje per leteroj sufiĉe spacitaj; ĝis la amiko tamen, spite al la intenco de Georgo, interesiĝis pri tiu strangaĵo.

Tamen Georgo preferegis skribi al li tiajn aĵojn ol konfesi, ke li mem antaŭ monato kun iu fraŭlino Frida Brandenfeldo, knabino el bonstata familio, fianĉiĝis. Ofte li parolis kun sia fianĉino pri tiu amiko kaj pri sia apartspeca korespondrilato kun li. "Do li tute ne venos al nia geedziĝo", ŝi diris, "kaj mi havas tamen la rajton ekkoni ĉiujn viajn amikojn." "Mi ne volas lin ĝeni", respondis Georgo, "komprenu min, li verŝajne venus, almenaŭ mi kredas tion, sed li sentus sin devigita kaj damaĝita, eble min enivus, kaj, certe malkontenta kaj nekapabla iam forigi tiun malkontenton, sole reveturus. Sola - ĉu vi scias, kion tio signifas?" "Sed ĉu li ne povas ekscii pri nia geedziĝo ankaŭ alimaniere?" "Tion mi ja ne povas malebligi, sed pro lia vivmaniero tio estas malverŝajna." "Se vi havas tiajn amikojn, Georgo, vi tute ne devus fianĉiĝi." "Pri tio ni ja ambaŭ kulpas; sed ankaŭ nun mi ne volus alie." Kaj kiam ŝi poste, vigle spirante sub liaj kisoj, ankoraŭ eligis: "Verdire tio tamen ĉagrenas min", li opiniis tute sendanĝera, skribi ĉion al la amiko. "Tia mi estas, kaj tian li devas min akcepti", diris li por si mem, "mi ne povas el mi eltranĉi homon eble pli taŭgan por la amikeco kun li, ol mi estas."

Kaj efektive li raportis al sia amiko en tiu longa letero, skribata tiun dimanĉmatenon, la okazintan fianĉiĝon tiuvorte: "La plej bonan novaĵon mi rezervis por la fino. Mi estas fianĉiĝinta kun iu fraŭlino Frida Brandenfeldo, knabino el bonstata familio, kiu enlokiĝis ĉi tie nur longe post via forvojaĝo, do vi certe ne konas ŝin. Troviĝos okazo por plie detali al vi pri mia fianĉino, hodiaŭ al vi sufiĉu, ke mi estas vere feliĉa kaj ke nia reciproka rilato nur tiom ŝanĝiĝis, ke vi nun havos en mi anstataŭ tute ordinaran amikon, feliĉan amikon. Krome vi ricevos en mia fianĉino - kiu vin salutas elkore kaj kiu plej baldaŭ mem skribos al vi - sinceran amikino, kio ne estas tute sensignifa por

fraŭlo. Mi scias, ke multspecaj kaŭzoj retenas vin de vizito ĉe ni, sed ĉu ĝuste nia geedziĝo ne estus bona okazo por unu fojon flankenĵeti ĉiujn barojn? Sed kiel ajn, agu sen iu konsidero kaj sole laŭ via plaĉo."

Tiun leteron enmane, Georgo sidis longe, vizaĝalfenestre, ĉe sia skribotablo. Al konato, kiu preterpasante lin salutis de la strateto, li apenaŭ respondis per neĉeesta rideto.

Fine li enpoŝigis la leteron kaj, el sia ĉambro oblikve trapaŝante etan koridoron, eniris la ĉambron de sia patro, en kiu li de monatoj ne estis. Estis ja ankaŭ nenia neceso por tio, ĉar li konstante komunikis kun sia patro en la magazeno, la tagmanĝon ili kune prenadis en manĝejo; estas vere ke vespere ĉiu prizorgis sin laŭplaĉe, sed poste ili plej ofte sidis (kiam Georgo ne estis, kiel plej multe okazis, kun amikoj aŭ nun vizitadis sian fianĉinon) ankoraŭ momenton, ĉiu kun sia gazeto, en la komuna salono.

Georgo miris pri la malhelo de la patra ĉambro eĉ dum tiu sunplena mateno. Tioman ombron do ĵetis la alta muro, kiu leviĝis vidalvide al la mallarĝa korto. La patro sidis ĉe la fenestro en angulo, kiu estis ornamita per diversaj memoraĵoj pri la forpasinta patrino, kaj legis la gazeton, kiun li tenis flanke antaŭ la okuloj, tiel kompensante ian vidmalfortecon. Sur la tablo staris la restaĵoj de la matenmanĝo, de kiu laŭŝajne ne multo estis manĝita.

"Ho, Georgo!" diris la patro kaj tuj iris al li renkonte. Lia peza negliĝo malfermiĝis dum lia irado, la pintoj lin ĉirkaŭflirtis - "mia patro estas ankoraŭ giganto", diris Georgo al si.

"Tie ĉi estas ja neelteneble mallume", li diris poste.

"Ja, mallume estas, certe", diris la patro.

"La fenestron vi ankaŭ estas ferminta?"

"Tiel mi preferas."

"Estas ja tute varme ekstere", diris Georgo, kvazaŭ aldone al la antaŭo, kaj sidiĝis.

La patro deprenis la matenmanĝilon kaj metis ilin sur ŝrankon.

"Mi volis vere nur al vi diri", daŭrigis Georgo kaj sekvis tute perdiĝinte la movojn de la maljuna homo, "ke mi nun tamen indikis mian fianĉiĝon al Peterburgo." Li elpoŝigis iomete la leteron kaj refaligis ĝin.

"Ĉu al Peterburgo?" demandis la patro.

"Al mia amiko do", diris Georgo kaj serĉis la patrajn okulojn. - "En la magazeno li estas do tute alia", li pensis, "kiom larĝe li sidas ĉi tie, kaj la brakojn surbruste krucitaj."

"Ja, al via amiko", diris la patro emfaze.

"Vi scias ja, patro, ke mi unue volis prisilenti al li mian fianĉiĝon. Pro takto, pro neniu alia motivo. Vi scias mem, li estas delikata homo. Mi diris al mi: de

alia flanko li povas ja bone ekscii mian fianĉiĝon, kvankam, ĉe lia vivmaniero, tio estas apenaŭ verŝajna - tion mi ne povas malebligi -, sed de mi mem li absolute ne devas tion ekscii.”

“Kaj ĉu nun vi ŝanĝis vian sintenon?” demandis la patro, metis la grandan ĵurnalon sur la fenestrobreton kaj sur la ĵurnalon la okulvitrojn, kiujn li kovris per la mano.

“Jes, nun mi ŝanĝis la decidon. Se li estas mia bona amiko, mi diris al mi, tiam mia feliĉa fianĉiĝo estas feliĉo ankaŭ por li. Kaj pro tio mi ne plu hezitis tion indiki al li. Tamen antaŭ ol alpoŝtigi la leteron, mi volis tion diri al vi.”

“Georgo”, diris la patro kaj larĝigis la sendentan buŝon, “aŭskultu! Vi venis pro tiu afero al mi, por interkonsiliĝi kun mi. Tio sendube honoras vin. Sed tio estas nenio, ja pli ol nenio, se vi ne diras al mi nun la tutan veron. Mi ne volas suprenkirli aferojn, kiuj ne koncernas tion. Depost la morto de nia kara patrino okazis certaj nebelajoj. Eble ankaŭ por ili venos la tempo, kaj eble pli frue ol ni pensas. En la negoco iuj aferoj min preterpasas, eble tio ne estas al mi kaŝata - mi volas nun tute ne starigi la konjekton, ke ĝi estas al mi kaŝata -, mi ne plu estas sufiĉe forta, mia memoro malfortiĝas, mi ne plu havas la vidon por ĉiuj tiel multaj aferoj. Tio estas unue la irado de la naturo, kaj due la morto de nia panjo min deprimis multe pli ol vin. - Sed ĉar ni ĝuste parolas pri tiu afero, pri tiu letero, mi petas vin, ne trompu min. Estas eteco, estas ne inda je spiro, do ne trompu min. Ĉu vi havas vere tiun amikon en Peterburgo?”

Georgo ekstaris embarase. “Ni lasu miajn amikojn. Mil amikoj ne anstataŭas mian patron. Ĉu vi scias, kion mi kredas? Vi ne sufiĉe domaĝas vin. Tamen la maljuneco postulas siajn rajtojn. Vi estas al mi nemalhavebla en la negoco, tion vi ja scias tre bone, sed se la negoco minacus vian sanon, mi jam morgaŭ fermos ĝin por ĉiam. Tiel ne povas daŭri. Ni devas do enkonduki alian vivmanieron por vi. Sed ĝisfunde. Vi sidas ĉi tie en la mallumo, dum en la salono vi havus belan lumon. La matenmanĝon vi tuŝetas, anstataŭ vin dece refortigi. Vi sidas ĉe fermitaj fenestroj, dum la aero al vi tiom bonfarus. Ne, mia patro! Mi venigu la kuraciston, kaj ni sekvos liajn preskribojn. Ni interŝanĝos la ĉambrojn, vi translokiĝos en la antaŭan ĉambron, mi ĉi tien. Estos neniu ŝanĝo por vi, ĉio estos kunportita. Sed ĉio ĉi povas atendi, nun enlitiĝu ankoraŭ iomete, vi nepre bezonas ripozon. Venu, mi helpu vin senvestiĝi, vi vidus ke mi povas. Aŭ ĉu vi volas tuj iri en la antaŭan ĉambron, tiam kuŝigu vin provizore en mian liton. Tio estus cetere tre saĝa.”

Georgo staris rekte apud sia patro, kiu estis

malleviginta sian hirte blankharan kapon sur la bruston.

“Georgo”, diris la patro mallaŭte, senmove.

Georgo algenuiĝis tuj antaŭ la patro, li vidis la pupilojn en la laca vizaĝo de la patro, grandegajn en la okulanguloj, sur lin direktitajn.

“Amikon en Peterburgo vi ne havas. Ĉiam vi estis ŝercemulo, kaj eĉ kontraŭ mi vi ne estis retenigema. Kiel vi havus ĝuste tie amikon! Tion mi tute ne povas kredi.”

“Rememoru do iom, patro”, diris Georgo, levis la patron de la brakseĝo kaj malvestis al li - kiom malforte li tie staris - la negliĝon, “nun estos baldaŭ tri jaroj, de post mia amiko estis ĉe ni vizite. Mi memoras ankoraŭ, ke vi ne speciale ŝatis lin. Almenaŭ dufoje mi forneis lin antaŭ vi, kvankam li sidis en mia ĉambro. Mi povis ja sufiĉe bone kompreni vian malemon kontraŭ li, mia amiko havas siajn strangajn flankojn. Sed aliflanke vi poste kun li sufiĉe bone interbabilis. Tiam mi estis tiom fiero, ke vi lin aŭskultis, kapjesis kaj demandis. Se vi pripensos, vi certe memoros. Li rakontis tiam nekredablajn historiojn pri la rusa revolucio. Kiel li ekzemple vidis, dum komerca vojaĝo en Kievo, en tumulto pastron sur balkono, kiu tranĉis larĝan sangokrucon en la platan manon, levis tiun manon kaj alvokis la amason. Vi mem ja plurfoje rerakontis tiun historion.”

Intertempe Georgo sukcesis residigi la patron kaj atenteme demeti al li la trikitan kalsonon, kiun li portis super la tolan, same kiel la ŝtrumpetojn. Vidante la ne elstare puran tolaĵon, li riproĉis al si, esti neglektinta la patron. Estus certe ankaŭ lia devo, zorgi pri la patra tolaĵo. Kun sia fianĉino li ankoraŭ ne eksplicite parolis pri kiel aranĝi la estonton de la patro, ĉar ili neesprimite supozis, ke la patro restos sola en la malnova loĝejo. Sed nun li senhezite kaj firme decidiĝis kunpreni la patron en sian estontan loĝejon. Ŝajnis ja, ĉe pli preciza rigardo, kvazaŭ la prizorgo tie destinota al la patro - eble venus tro malfrue.

Surbrake li portis la patron enliten. Teruran senton li spertis, kiam dum tiuj kelkaj paŝoj al la lito li rimarkis, ke ĉe lia brusto la patro ludis per lia horloĝa orĉeno. Ne tuj li povis lin enlitiĝi, tiom firme li sin tenis ĉe tiu orĉeno.

Apenaŭ la patro estis tamen enliten, ĉio ŝajnis en plej bona ordo. Li mem kovris sin kaj poste tiris la kovrilon kun aparta zorgo super la ŝultron. Ne malafable li supren regardis al Georgo.

“Ĉu ne, vi jam memoras pri li?” demandis Georgo kaj kuraĝige al li kapjesetis.

“Ĉu mi estas nun bone kovrita?” demandis la patro, kvazaŭ li ne povus rigardi, ĉu liaj piedoj estas bone

kovritaj.

“Do, jam al vi plaĉas enlite”, diris Georgo kaj metis la kovraĵon pli bone ĉirkaŭ lin.

“Ĉu mi estas bone kovrita?” ree demandis la patro kaj ŝajnis aparte atenti la respondon.

“Estu nur trankvila, vi estas bone kovrita.”

“Ne!” kriis la patro eĉ antaŭ la fino de la respondo, kaj reĵetis la kovrilon per tia forto ke ĝi por momento dumfluge sin tute malvolvis, kaj staris rekte sur la lito. Nur unu manon li iomete tenis ĉe la plafono. “Vi volis min kovri, tion mi scias, mia bubeto, sed kovrita ankoraŭ mi ne estas. Kaj eĉ se estas mia lasta forto - sufiĉa por vi, tro por vi. Vian amikon mi konas bone. Tiu estus filo laŭ mia koro. Tial vi trompis lin la tutajn jarojn. Kial alie? Ĉu vi kredas, ke mi ne ploris pro li? Pro tio do vi enŝlosas vin en via oficejo - neniu ĝenu, la ĉefo estas okupita - nur ke vi povu skribi viajn falsajn leteraĵojn al Ruslando. Sed feliĉe neniu bezonas instrui la patron travidi la koron de la filo. Kiam vi nun pensis, ke vi estas dresinta lin, tiom dresinta, ke vi povas eksidi sur lin per via postaĵo, kaj li ne moviĝas, tiam mia sinjoro filo sin decidis al edziĝo!”

Georgo supren rigardis al la patro - al timigilo. La Peterburga amiko, kiun la patro nun subite tiel bone konis, lin kaptis, kiel neniam antaŭe. Li vidis lin perdita en la vasta Rusujo. Li vidis lin ĉe la pordo de la malplena, prirabita magazeno. Li staris ankoraŭ tie, inter la ruinaĵoj de la bretaro, la disŝiritaj varoj kaj falantaj gastuboj. Kial li ĝuste devis foriri tiom malproksimen!

“Sed rigardu min!” vokis la patro, kaj Georgo kuris, preskaŭ distrite, por ĉion kapti, al la lito, sed haltis duonvoje.

“Ĉar ŝi levis la jupon”, la patro ekflutis, “ĉar ŝi levis la jupon, tiu abomena anserino”, kaj li levis, por tion demonstri, sian ĉemizon tiome, ke oni vidis sur lia femuro la cikatron el la militaj jaroj, “ĉar ŝi levis la jupon tiel kaj tiel kaj tiel, pro tio vi alkuris ŝin; kaj por ke vi povu senĝene per ŝi kontentigi vin, vi senhonorigis la memoron de nia patrino, perfidis la amikon kaj ŝtopis la patron enliten, por ke li ne povu sin movi. Sed ĉu li povas sin movi aŭ ne?”

Kaj li staris tute libere kaj ĵetmavis la gambojn. Li radiis pro inteligenteco.

Georgo staris enangule, plej eble malproksime de la patro. Antaŭ ioma tempo li firme decidis, ĉion zorge kaj precize observi, por ke li ne povu iel, malrekte, de malantaŭe, de supre, esti surprizita. Nun li ree memoris la delonge forgesitan decidon kaj ĝin reforgesis, kiel oni tiras tro mallongan fadenon tra pinglotruo.

“Sed la amiko tamen ne estas perfidita!” kriis la patro, kaj lia skuata montrofringro konfirmis tion. “Mi estis lia surloka reprezentanto.”

“Komedianto!” krii Georgo ne povis sin deteni, tuj konsciis la damaĝon kaj mordis, nur tro malfrue - la okulojn rigidiĝintaj - en sian langon tiom, ke li pro doloro kliniĝis.

“Ja certe mi ludis komedion! Komedion! Bona vorto! Kia alia konsolo restis por la maljuna, vidviĝinta patro? Diru - kaj dum la momento de la respondo estu ankoraŭ mia vivanta filo -, kio alia restis al mi, en mia malantaŭa ĉambro, persekutata de la malfidela personaro, ĝisoste maljuna? Kaj mia filo trairis la mondon jubile, kontraktis negocojn de mi preparitajn, transkapiĝis pro plezuro kaj deiris de sia patro kun la fermita vizaĝo de honestulo! Ĉu vi kredas, ke mi ne amis vin, mi, de kiu vi eliris?”

“Nun li antaŭen kliniĝos”, pensis Georgo, “se li falus kaj frakasiĝus!” Tiu vorto trasiblis lian kapon.

La patro sin antaŭen klinis, sed ne falis. Ĉar Georgo ne alproksimiĝis, kion li estis atendinta, li rektigis sin.

“Restu, kie vi estas, mi vin ne bezonas! Vi pensas, ke vi havas ankoraŭ la forton por veni ĉi tien kaj ke vi nur vin retenas, ĉar tiel vi volas. Ne eraru pri vi mem! Mi estas eĉ nun ankoraŭ la multe pli forta. Sole mi eble estus devinta cedi, sed via patrino aldonis al mi sian forton, kun via amiko mi majeste ligis min, vian klientaron mi havas tie ĉi en la poŝo!”

“Eĉ en ĉemizo li havas poŝojn!” diris al si Georgo kaj kredis, ke li povos lin per tiu rimarkigo ridindigi antaŭ la tuta mondo. Nur dum momento li pensis tion, ĉar ĉiam li forgesis ĉion.

“Provu nur alkroĉi vin ĉe via fianĉino kaj tiel veni al mi renkonte! Mi balaos ŝin for de via flanko, vi eĉ ne komprenos, kiel!”

Georgo grimacis kvazaŭ li tion ne kredus. La patro nur kapjesis al la angulo de Georgo, tiel certigante la veron de kion li diris.

“Kiom do vi amuzis min hodiaŭ, kiam vi venis kaj demandis, ĉu vi skribu al via amiko pri la fianĉiĝo. Li scias do ĉion, stulta knabo, li scias do ĉion! Mi skribis al li, ĉar vi forgesis al mi forpreni la skribpaperon. Tial li jam de jaroj ne plu venas, li scias ja ĉion centfoje pli bone ol vi mem, viajn leterojn li disĉifas nelegitaj en la maldekstra mano, dum li tenas en la dekstra antaŭ si miajn leterojn por legado!”

Sian brakon li triumfe svingis super la kapo. “Li scias ĉion milfoje pli bone!” kriis li.

“Dekmilfoje!” diris Georgo, por priridi la patron, sed jam enbuŝe la vorto ricevis mortseriozan sonon.

“Jam de jaroj mi atendas, ke vi venu kun tiu

demando! Ĉu vi kredas, ke mi ne legas gazetojn? Jen!” kaj li ĵetis al Georgo ĵurnalfolion, kiu iel estis kunportita enliten. Malnova ĵurnalo, kun nomo al Georgo jam tute nekonata.

“Kiom longe vi hezitis, antaŭ ol maturiĝi! La patrino devis morti, ŝi ne povis ĝisvivi la ĝojotagon; la amiko pereas en sia Ruslando, jam antaŭ tri jaroj li estis tiom flava, kvazaŭ por forĵeti; kaj mi, vi vidas ja, kiel statas pri mi. Por tio vi havas ja okulojn!”

“Do vi spionis min!” kriis Georgo.

Komplete la patro diris, kvazaŭ pri detalaĵo: “Tion vi volis verŝajne diri pli frue. Nun ĝi ja tute ne plu taŭgas.”

Kaj pli laŭte: “Nun vi scias ja, kio ekzistis ankaŭ krom vi, ĝis nun vi sciis nur pri vi! Senkulpa infano vi ja vere estis, sed pli vere vi estis diableca homo! - Kaj tial sciu: Mi kondamnas vin nun al morto je drono!”

Georgo sentis sin elpelata el la ĉambro; la falbruon, kun kiu malantaŭ li la patro falis sur la liton, li ankoraŭ enorele kunportis. Sur la ŝtuparo, super kies ŝtupojn li rapidis kvazaŭ super dekliva ebena, li koliziis kun sia servistino supreniĝanta por ordigi la loĝejon post la nokto. “Jesu!” ŝi kriis kaj per antaŭtuko kovris

la vizaĝon, sed li estis jam for. Tra la dompordo li saltis, trans la straton, al la akvo li estis pelata. Jam li tenis firme la parapeton, kiel malsateganto la nutraĵon. Li svingis sin transen, kiel la elstara gimnasto, kiu li estis dum sia juneco, je la fiero de siaj gepatroj. Ankoraŭ li tenis sin per manoj malfortiĝantaj, ekvidis inter la parapetaj stangoj aŭtomobilan omnibuson, kiu facile superbruos lian falon, kriis mallaŭte: “Karaj gepatroj, mi do ĉiam amis vin”, kaj lasis sin defali.

Dum tiu momento okazis sur la ponto vere senfina trafiko.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kafka.html>

* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kierling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

Por Hori Jasuo



Aŭtuno

Pejzaĝ' unika –
kolorriĉec' sur la ter'.
Aŭtuna spiro.

hajko de **Elena Popova**, Bulgario
bildo de **Hori Jasuo**, Japanio

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario



Tera Edeno


La lagaj okuloj
al ĉiel' rigardas.
Por la varmaj tagoj
freŝecon gardas.

poemeto de **Elena Popova**, Bulgario
bildo de **Hori Jasuo**, Japanio



John Francis
pintulo bezonas reeldonon

Antaŭ 54 jaroj aperis la unua volumo en bel-literatura eldon-serio de Stafeto, la eldonejo, kiun fondis Juan Régulo Pérez en La Laguna, Tenerife. Per tiu volumo, titolita Kvaropo, la kar-memora eldonisto lanĉis mirinde konstantan fluon de alt-valoraj libroj, originalaj kaj tradukitaj, fluon seninterrompan dum pli ol kvaron-jarcento.



Estis aparte konvene, ke tiu unua libro de la nova eldonejo jam eklevis la standardon de nova poezia skolo sur la kampo de nia literaturo. Tiun oni baldaŭ komencis nomi la skota skolo, probable nur pro geografiaj kaŭzoj, ĉar tri poetoj prezentitaj en la libro: Auld, Dinwoodie, Francis, estis ĉiuj skotaj. Ili tamen estas malsimilaj laŭ stiloj kaj temoj. Unu el tiuj poetoj estis John Francis, pri kiu temas ĉi tiu artikoleto.

John Islay Francis naskiĝis en 1924, samaĝano de William Auld, lia samlandano kaj amiko ekde junaĝo. Kaj estis Auld, kiu jam tiam persvadis John lerni Esperanton, kaj jarojn poste, instigis lin komenci aperigi siajn poemojn en Esperanto-revuoj. Estis tamen nur per la eldono de Kvaropo, ke la du amikoj aperis libre, Auld per sia poemaro Spiro de l' pasio kaj Francis per sia granda poemo **La kosmo**.

La kosmo estas ja granda poemo, 71 kvarliniaj strofoj kiuj dividiĝas iom neegale en 5 partojn aŭ ĉapitrojn. La temo estas eksterordinara: la historio – se oni povas nomi tion historio – de la kosmo ekde “la nigro de nenio” ĝis la fino, kiam “la astroj daŭre dronas en la mallum’ avida”. La ĉefa parto de la poemo tamen ne estas la kosmo ĝenerale, sed la evoluo de nia sunsistemo kaj de la vivo sur la tero, aparte de la homaro, kiun la poeto sekvas ĝis ĝia rifuĝo al aliaj planedoj, kie la vivopovo “sin armas kontraŭ velko kondiĉoj homfaritaj”, sed ankaŭ tiuj mortas, ĉar fine “la suno mem formortas, elkonsumiĝas nigre”.

La poeto bazas sian rakonton sur sciencaj teorioj, kio gvidas lin laŭ vojo de objektiva pesimismo, li nur observas dum sia vojaĝo ekde la komenco ĝis la fino, konstatas senemocie la kosmajn faktojn. La rakonto estas rapida, la epizodoj sekvas unu la alian senhalte,

senindulge. Jen la strofo, kiu priskribas la viziton de la homoj sur la luno:

*Tombeskajn lunkraterojn invadas pinta ŝipo,
 sur fundo glite haltas, kaj elgorĝigas homojn,
 kiuj explore grimpas ĝis la kratera lipo,
 rigardas nudajn stepojn, montegojn kaj kanjonojn.*

Sed la homo devas daŭrigi sian esploron, atendas la planedo Marso:

*Ĉe l' morna lunpejzaĝo ne haltas homa peno.
 La ruĝa marsa sablo al serĉo lin provokas.*

Ĉu La kosmo havas paralelon en aliaj lingvoj mi ne scias, – certe ne en Esperanto.

John Francis ja verkis pliajn poemojn, sed tamen li estas pli konata kiel verkinto de prozo. Tie elstaras lia romanego La granda kaldrono, kiu aperis en 1978. Laŭdire la verkado de tiu ĉefverko de originala prozo en Esperanto daŭris pli-malpli dek jarojn. La romano estas ja ampleksa, preskaŭ 600 paĝoj, sed pli impresa estas ĝia imponeco laŭ temo kaj la ellaborado de tiu temo. Ĝi estas rakonto pri milito, pri sintenoj al milito, pri efikoj de milito.

Pli precize la romano rakontas pri personoj kaj eventoj tuj antaŭ kaj dum la du mondmilitoj. Iusence temas pri familia kroniko, kie rolas la gefratoj Duncan kaj Ina kaj iliaj filoj, kaj multaj flankuloj. La longa okaz-tempo rezultas en du rakonto-fadenoj, kiuj alternas kun epizodoj divers-longaj.

Tiu metodo de rakontado faras postulojn al la leganto, sed iom post iom la roloj de la personoj klariĝas. Iliaj sintenoj al la militoj estas diversaj, militemuloj ĉefe troviĝas inter iuj el la flankaj personoj, ĉe la ĉefaj personoj la opinioj malsamas, entuziasmo mankas, sed la aŭtoro klare komprenigas, ke libereco de elektoj por aŭ kontraŭ en tiaj cirkonstancoj estas limigita.

Priskriboj estas realismaj, precipe pri la okazaro en la unua mondmilito. Dialogoj, ofte longaj, formas gravan parton de la verko, ili estas realisme vivaj kaj plifaciligas la legadon, kiu okaze lacigas per siaj senindulgaj postuloj. Entute, la romano de Francis estas verko de digna stabileco, bazita sur la profundaj spertoj, longdaŭra meditado kaj kree eltenaj kapabloj de realisma verkisto.

Apenaŭ troviĝas en nia literaturo verkoj kompareblaj kun La kosmo kaj La granda kaldrono, ili estas unikaj. Sed John Francis aŭtoris ja pliajn verkojn: sciencfikcian romanon, *Misio sen alveno*

(1982) kaj du novelarojn, *Vitrato* (1960) kaj *Tri rakontoj pri la Miljara Paco* (1998).

Misio sen alveno estas lerte verkita rakonto laŭ la kutima formulo pri kosma vojaĝado, esplorado de aliaj planedoj kaj civilizoj, saltoj de universo al universo, senfina serĉado de neniam atingotaj celoj. Sed la aŭtoro uzas la sciencfikcian formon por pli aktualaj esploroj de diversaj homaj kondiĉoj, pri konduto de homoj, pri la sento de homa soleco en fremdaj cirkonstancoj, kio donas apartan dimension al la rakontado.

La du novelaroj grandparte estas fabelecaj rakontoj kun mesaĝo, kompetente disvolvitaj; du noveloj en *Vitrato* tamen staras aparte kiel realisma pritrakto de mensokaptaj temoj: *La tuŝo de morto* pri

sperto de bombaviadila ekspedicio en la dua mondmilito, kaj *Ĝermoj en rikolto* pri rilatoj inter infanoj en Skotlanda insulo.

John Islay Francis estas eksterdube unu el niaj plej kompetentaj prozverkistoj. Lia ĉefverko, *La granda kaldrono*, nepre meritas reeldonon kaj plian atentigon inter la Esperanta legantaro.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 115, 2006)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/francis.html>

Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Dum beletra lecionhoru

kaj lian opinion demandas.

Ĉu oni povas kompari mortojn pro militoj kun tiuj pro malsanoj aŭ dum akcidentoj?



Profesori al studentoj diras:
-Hodiaŭ la temo estos
Deveno kaj signifo
de la vorto "homeca"

Kvankam do li
dum momento silentis
respondon ne malfruigas

Ĉu ekzistas pli granda hipokriteco ol nomi homeca, bona, nobla estaĵon alportanta nur teroron!

Kaj de plej bona studento doni respondon li postulas kaj ĉi tiu ne malfruas respondon tuj proponi:

- de vorto homo devenon ĝi havas sed signifo kion ni donas vera, tamen, ĝi ne estas

Signifon kiun ni donas al tiu per vorto "malhomeca" li meritas alie iu ajn grave eraras

-Tio de vorto homo venas
La vera signifo estas
Neniam malbonojn faru dumvive krimojn ne faru.

Diru min ĉu estis krimo aŭ fiago kiu ne estas plenumita de la estaĵo homo?!

Surprizite profesoro fulme alrigardis lin pensante ke ankaŭ li saman opinion dividis.

Lin amo motivigas por libero li batalas ke malriĉeco ne ekzistu ke homoj dignecon havu.

Ĉu ekzistas en naturo alia vivaĵo kiu masive mortigas siajn similulojn kaj neniam penton esprimis?!


Tirana, 19/08/2017

Li disdonas ien ajn elkoran bonecon por ke paco enmonde regu kaj egaleco same estu


Ĉiam li orgojlas pro tio kiom multe da homoj mortiĝis veraj homoj sed alietnecaj..

-Bravu!,-
profesoro lin aldiras kaj kiel ĉiam Markon dek vi meritas

Poste sian rigardon profesoro ĵetas al plej inteligenta studento sed samtempe plej ribelema,



Ŝercoj



- Mi havas du novaĵojn: unu bonan kaj unu malbonan. Kiun rakonti komence?

- La malbonan.

- Mi ne havas bonajn novaĵojn.

- Kaj kio estas la bona?

- Mi ne havas malbonajn novaĵojn.

* * *

Du amikinoj

- Oj, mia edzo foriris labori. Mi telefonis al li sed li ne respondas al mi. Mi suspektas ke li iris al amorantino.

- Karulino, kial vi tuj suspektas la plej malbonon. Eble li simple falis sub iu aŭtomobilo...

* * *

Geedzoj en la teatro:

Edzo: "Karulino, ĉu via sidloko estas bona?"

Edzino: "Jes, karulo, tre bona."

Edzo: "Ĉu vi povas vidi ĉion?"

Edzino: "Jes, karulo, mi vidas ĉion."

Edzo: "Ĉu ni povas interŝanĝi niajn sidlokojn?"

SE IU ĴETAS ŜTONON AL VI,
ĴETU FLORON AL LI...
SED NE FORGESU LA POTON KUN ĜI !



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. En ___ kaj ludo ofte sidas aludo (Zamenhof); 6. ___ Francujo k Polujo kuŝas Germanujo; 7. Landokodo de Franca Polinezio; 8. Simbolo por neodimo je kemio; 9. En ŝerco kaj ludo ofte sidas ___; 11. La numeralo 0 (akuzativo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Rilatan al ŝipo; 2. Flu- en ion; 3. Konsonantoj de rato; 4. Centono de dolaro aŭ de eŭro; 5. Aranĝon, sekvencon; 10. Sufikso signifanta individuon.

Fonto: Semajno de Enigmoj #5

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

1	2	3	4	5
6				
7			8	
9		10		
11				

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en paĝo 26)

5>> antaŭa. Filmita surbaze de la teatraĵo de juna verkisto Florian Zeller. La skripto estas versio de malnovaj vodeviloj adaptita al luksa apartamento en la nuna tempo en Parizo.

La temo estas simpla. Dentisto Michel estas entuziasmulo de ĵazo. Li alvenas hejmen ĝoje por aŭskulti la albumon "Me, Myself and I", kiun li aŭskultis antaŭ tre longe kaj kiun li trovis en vendisto de malnovaj libroj. Baldaŭ lia entuziasmo aŭskulti ĉi tiun diskon forflugas per ĉenoj de eventoj. Li tute ne sukcesas aŭskulti ĝin de komenco ĝis fino. Konfesoj, perfidoj, enmigrintaj laboristoj fosante tie kaj ĉi tie en lia hejmo, orgojla, juna aktivisto, kiu vivas per patra mono, azilpetantoj, amikema pola najbaro kaj ia sabata festo... Michel volas meti la diskon sur la diskludilon kaj ĝui ĝin sed tro da misfortuno okazas al li.

Komence mi skribis: "Tri Viroj Du Filmoj"! Jen la tria viro: Michel; ĉirkaŭ kies Patrice Leconte konstruis la rakonton. Viro kiu perdas sian komforton kaj stabilecon ne pro nur unu, sed pro multaj homoj samtempe. Michel faras du belajn mallongajn dialogojn kun la malgranda azia enmigrinta knabino

Diana. Ĉi tiu malgranda, simpata aktorino parolas pere de ŝiaj rigardoj. Ŝi eĉ ne bezonas paroli voĉe. Dum Michel parolas kun Diana, li demandas sin, kial li ne rekte iris al tiu persono, kun kiu li vere povus kundiĉi sian plej ŝatatan muzikon.

Fikcio, kiu malfermiĝas per disko kaj fermiĝas per disko, trenas nian atenton de komenco ĝis fino. Ni ne pensas tre profunde, sed sama al la vodeviloj en teatro, la filmo konstante stimulas nian intereson, trenante nin de rideto al rideto; de ridego al ridego. Leconte, kiu estas verkisto kaj desegnisto de komiksoj pravas lian talenton ankoraŭfoje.



verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo la 26-a de decembro 2019, Büyükada, Istanbul

**“Proponi Trankvilan Morton”
Kiel ni renkontas nian lastan momenton?**

de Dr. Isitobi Kozoŭ

(Kobe ĵurnalo 2019/06/10 08/26:
vespera ĵurnalo, ĉiu sabato)

Dr. Isitobi Kozoŭ naskiĝis en la jaro 1935 en gubernio Hiroŝima, Japanio. En la jaro 2005, li konvertis de la Tokjo Saiseikai Centra Hospitalo kiel kirurga doktoro al la speciala maljuna protektaĵo “Aŝihana Kadukulejo” (Setagaja, Tokjo) kiel regula doktoro. En la jaro 2005, li proponis la trankvilan morton. Poste, li kontinue ekspedas la meriton per diversaj rimedoj de la kadukulejo.

Mi deziras proponi trankvilan morton kiel la ideala rimedo por la fino de la vivo.

(daŭrigata)

5 Sento estas disŝirita pro amo al gepatoroj

La sangrilato ne konformas al la teorio. Ĉiuj ŝanĝas siajn kutiman penson nur pri siaj parencoj. Eĉ flegisto, kiu povas adekvate rekomendi al la hezitanta paciento familia en elekto de terminala kuracado kaj estas konfidita de ĉiuj, ne povas juĝi rezone pri sia parenco. Mi kiel doktoro inklinas diri precize sen konsidero pri alia kondiĉo en la intertrakto. Tiam flegestro rekomendas, “Doktoro! Ĉiuj ne povas juĝi ekzakte pri la morto de siaj gepatroj.” La flegestro nun prizorgas pri sia patrino en sia hejmo, kaj diras, “Du personoj kune estas en mi, persono kiu prizorgas vivantan patrinon, kaj persono kiu ĉirkaŭpremas forpasintan patrinon sur la ĉielo.” Frakasite la prizorgadan realon, ŝi sonĝas idealan relaton kun patrino. Ŝi diras, ke sia pensado eble kaŭzas de amo, profunda ligilo, kaj nerompeblo. Sangrilato estas simila al amrilato. Ĉar ili amas tiel, sed ia fendo naskiĝas en ilia amikeco pro bagatela kialo. Ilia sento skuiĝas forte. Amikiĝo ŝanĝiĝas en malamikiĝon, kaj la kamarado estas persekutita reciproke en senlirejon. Eblas okazi kruela trakto. Antaŭ longa tempo estis dirita en Japanio, “Kiam ni volas sincere servi, gepatroj jam forpasis.” Tamen, la longviveco de gepatroj pli ol 80 jaroj estas nun normala, kaj venas la erao, kiam la etfamilio kiu ne havas subtenulo envolviĝas ofte en prizorga inferno: “Ĝis kiam daŭras la degeraĵo?” Kiam la stato de gepatroj malbonigas, la

prizorgado ligas al la terminala kuracado. La espero “Ĉiuokaze ni volas, ke gepatroj vivas pli longe” ligas la ekscesan deziron al medicino, aŭ vivlongiga kuracado. Tial la homo, kiu komprenas racie kuracadan limon, estas disŝirita pro amo al gepatroj.




6 Tiu ĉi vivfina krakado estis reala kvazaŭ drama

Certa okazo: La lasta filino estis senedzeco. Ŝia patro jam forpasis, kaj kunloĝanta patrino estis pli ol 70 jaroj kaj havis demencan simptomon. Por la filino, ŝia patrino estis bravulo kaj fidindulo. Ŝi tuj diris malĝentile, “Panjo! Animfirmiĝu!” Tamen la patrino sentis jene: “Mi pensis, ke la virino, kiu staras tuj antaŭ mia nazo, estas mia kara filino kiun mi naskis el mia propra utero. Sed lasta tempe ŝi ĉiam turmentas min.” Do pretervole la patrino demandis, “Kiu vi estas?” La filino ekfurioziĝis, kaj komencis kruelan trakton al sia patrino. Administrado detiris la patrinon de filino, kaj aranĝis enirigi ŝin en la speciala protektaĵo. Post kelkaj jaroj, la patrino kadukiĝis, kaj enhospitaliĝis pro la misglutdevena pneŭmonio. La pneŭmonio poste resaniĝis kaj ŝi revenis al la kadukulejo. Tiam administrado juĝis ke ŝia fino estos proksima, kaj zorgis ŝin vidi la filinon. En la renkontiĝa ĉambro, estis la filino, bofratino, kaj administrado, flegestro kaj prizorgestro de kadukulejo, kaj mi. La filino koleris, “Vi prenis patrinon de mi, kaj ŝi faris en la jena malbona stato. Kial vi faras?” Mi severe respondis ŝin ofendiĝante sian arbitran aserton senkonsiderante respondecon por kruela trakto, “Vi estas vera monstro.” La filino ekploris freneze. Flegestro iris proksime, ĉirkaŭbrakis ŝian ŝultrojn, kaj frotetis ŝian dorson. Ŝi lasis esti ĉirkaŭbrakita senvorte. Ŝia bofratino deviŝis la larmon. Rezulte de la posta diskutado de bofratino, administrado, kaj kadukululoj, ŝi kunvivis en la ĉambro de patrino transportinte liton. Post unu semajno, ŝia patrino mortis trankvile. Ĉiuj apenaŭ ekspiris libere pro trankviliĝo. Mi ludis la rolon de kanajo, la filino estis lamentinta, kaj al flegestro estis admonkonsolanta. Ĝi estis la dramo de la vivfina medicino.

(daŭrigota)

tradukis kaj sendis Kacu Matoba el Japanio

En la novaĵretejo La Balta Ondo dum la tuta aŭtuno ĉiudimanĉe aperas poemoj el la nova, kvara eldono de la Baza Literatura Krestomatio. La tria poeto en nia dimanĉa poezia rubriko estas la Bohemia juda dentkuracisto, ĵurnalisto, verkisto kaj redaktoro Stanislav Schulhof (1864–1919).



Schulhof estas aŭtoro de tri originalaj poemaroj (Per espero al despero, 1911; Kion la vivo alportis, 1911; Aŭtunaj floroj, 1912). Posteume aperis lia antologieto Bohemaj grenatoj (1920) kun 30 poemoj de pluraj ĉeĥaj aŭtoroj. Oni ofte konsideras lin la unua individutona lirikisto en la Esperanta poezio.

Ni proponas al vi legi lian poemon Desperanto.

Agrablan legadon!

22 Septembro 2019 de **AIKo**

DESPERANTO

Dolĉe sonas via nova nomo,
ho Espero! nia bela vorto!
En la nokto plena je sopiro
vi, Espero, estas eliksiro,
sed nur eliksiro sen la forto.

Kontraŭ ĉio estas vi rimedo,
kiel kontraŭ superakvo muro,
sed vi estas sabla bariero,
ĉiam disfalanta en aero,
sed ni kredas je vi sen murmuro.

Tre agrabla vere estas sonĝo,
ankaŭ sonĝo pri la estonteco,
pri senĉesa homa harmonio,
unu amo, unu familio,
– sukeraĵo por la infaneco.

Ni atendas vane tempon belan,
kiam regos sole via nomo.
En eterna monda karuselo
vi Espero restos ĉiam stelo,
ĉiam malproksima por la homo.



Eĉ se iam jena tempo venos
post jarmiloj, kaj post miliardo,
tiam ree homon batos homo,
sed li batos lin en via nomo –
ankaŭ kun la stelo sur standardo.

(1911)

Ĉi tiu poemo aperis inter la 199 verkoj/fragmentoj de 82 aŭtoroj, publikigitaj en la nova eldono de la Baza Literatura Krestomatio (BLK) (p. 43), kuneldonita de Sezonoj (Kaliningrado) kaj Litova Esperanto-Asocio en julio 2019.

Legu pli pri BLK <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga121.htm>

Aĉetu ĝin kontraŭ 27 eŭroj en la libroservo de UEA
Legu pli pri Schulhof en la Esperanta Vikipedio, de kie estas prenita lia portreto.
Ĝis la sekva dimanĉo!

AIKo (Aleksandro Korĵenkov)

Fonto: **La Balta Ondo**
<http://sezonoj.ru/2019/09/blk-2>

28 >> Sanktaj Libroj, ke nia lando firme staros ĝis la senfino de la tempoj, ĉar tiel ordonis dio Kantra, kaj ke la kolero de la dio murmuris unuavice kontraŭ tiaspecaj herezuloj. Sed poste ili rekonis, ke ĉia deklaro kaj publika diskuto estus nur reklamo por Rata kaj liaj doktrinaĉoj. Oni do lin arestis, liajn skribojn forbruligis, lin mem malliberigis, kaj nuntempe oni jam malliberigas eĉ tiujn, kiuj nur mencias tiujn tezojn abomenindajn. Kaj ĉu vi volus amnestii tiun monstron?


— Ne, ja ne, neniel! — kriis Serva. — Kiel li puniĝas?
— Per dumviva mallibero.

— Ne sufiĉe! Eble li povos liberiĝi kaj plu veneni la animojn, ruinigi la patriotajn kaj religiemajn morojn kaj per tio frakasi la kredon de la homoj je nia futuro! Oni ĵetu lin al la sovaĝbestoj en la areno. Lia morto faros pli pompa la cirkajn ludojn jubileajn!
Ĉi tio okazis en Atlantis, unu monaton antaŭ dia subakviĝo.

(1970)

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Szathmari/index.html>

Ekvidis sin Simio en spegul', —
 Kaj Urson petas ĝi rimarki per okul':
 "Jen kia eksteraj', karul'!
 Vizaĝo tiu estas abomeno!
 Ridindas ĉiu mov', malsaĝas la grimac'!
 Ho, mi pendigus min, se estus la minac',
 Ke mi similu ĝin eĉ iom per mieno.
 Sed mi malkaŝas en konfes',
 Ke grimaculojn tiujn kvin aŭ ses
 Inter simioj mi kalkulos kun sukces'."
 "Ĉu decas pri aliaj la indiko?
 Prefere ekrigardu vin, amiko!»
 Respondis Urs' kun ironi'.
 Sed vortoj de konsil' malgravis por Simi'.
 Simila fakt' por mi ne estas miro:
 Ne ŝatas iu-ajn sin vidi en satiro.
 Jen efektiv' kaj ne karikatur':
 Ke Klim' ŝtelemas — ĉiu homo voĉas,
 Al Klimo pri korupto ni riproĉas,
 Sed Klim' per kaĉa mov' al Petro montras nur.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio

Bildoj de iu ekspozicio

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

Amikec' inter
 la infanoj de l' mondo.

Blanka kolombo.

Nokta reflektio
 en rivero. Nebulo.

Arboj - gardistoj.

Viro sur benko
 sonĝas pri sia junec'.

Gaja vizaĝo.

Amo tra l' tempo
 simia feliĉo. Ĉu
 ni ĝin forgesis?

Fiera kato,
 brakumita kun amo.

Aĝul' ridetas.

Portreto de la
 eksinstruistino'. Estim'
 de lernantino.

Floras tulipoj
 el la bildo. Printempa
 bunta beleco.

Leciono pri
 muziko. Kiu kantas?
 Atentaj buboj.

Maro ondiĝas
 sub la bunta ĉielo.
 Baldaŭ sunbrilos.

Propra portreto –
 esper' en la okuloj
 por sukcesa voj'.



Helga Plötner el Germanio

Tragedio pro la atombomboj (2)

Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearnila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinara armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

3) Fumoj el kremaciataj kadavroj



verkita de s-ro Tanaka Joŝimicu 92-jara, nun loĝanta en Tokio, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Akahata la 22an de majo 2019

Kiam mi estis 18-jara, mi estis sendita al la

verkis kaj tradukis Hori Jasuo, el Japanio

kontraŭaera artilerio sur la monteto Konpira en Nagasaki.

La 9an de aŭgusto 1945, tuj antaŭ la atombombado, la soldatoj estis ordonitaj prepari sin por la kontraŭpafado kaj kuris al la pozicio. Dume mi aŭdis siblan sonon, kaj je la krioj de la bandestro “Eksplozo proksima! Kuŝu!”, mi faligis min teren kun oreloj kovritaj de la manoj. La lumo estis tiel forta, ke mi travidus ostojn en miaj fingroj.

Mi estis forblovita 10 metrojn kaj falis en la kloakon. Mi elrampis kaj trovis, ke la monteto kovritaj de verdaĵoj fariĝis bruna, tial mi pensis, ke miaj okuloj difektiĝis.

La centro de la urbo Nagasaki estis en flamego. Baldaŭ ekfalas nigra pluvo, kaj faris nigrajn striojn sur la ĉemizo.

Ni estis ordonita esplori la damaĝojn kaj iris al la kuirejo, magazeno kaj lavejo. Tie kolektiĝis ĉirkaŭ 30 lernantoj. Ili perdis harojn kaj tiel serioze brulvundiĝis, ke mi ne povis scii, ĉu ili estas viroj aŭ virinoj. Mi donis akvon al ili, sed ili ne povis trinki ĝin, ĉar iliaj gorĝoj estis brulvunditaj.

Poste mi estis ordonitaj iri al la kremaciejo. Kava tereno, kie estis forbruligitaj barakoj, estis uzata kiel kremaciejo. Ni bruligadis po 40-50 kadavroj. Iu soldato legis sutron al ili.

La 10an ni estis ordonitaj iri al rifuĝejo. Tamen ĝi estis nur tereno kun sternitaj lankovriloj. Ne estis medikamento, do oni ne povis kuraci la suferantojn. Ni donis akvon kaj kaĉon al ili. Kiam homoj mortis, ni bruligis ilin.

Poste mi mem suferis pro akuta radiomalsano kaj suferis pro alta febro kaj lakso. Mia amiko perdis harojn, sur lia haŭto aperis purpuraj makuloj kaj la buŝoj sangis. Li baldaŭ mortis, dirante, ke li atendas min en la alia mondo.

Post la milito mi laboris en la gubernio Ooita en la eduka kampo kaj rakontis mian sperton en Nagasaki al gelernantoj.

En tiu tago nur per unu atombombo multege da homoj mortis en la varmo de 3000 gradoj. Ja okazas eĉ nun militoj en la mondo, sed ne ekzistas aliaj armiloj krom atombombo, kiuj povas mortigi pli ol centmil homojn momente, malnormaligas genojn kaj malfaciligas la vivadon. Nukleaj armiloj postulas mortojn eĉ en postaj generacioj. Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombombo du fojojn, do estas nia devo aboligi nukleajn armilojn.

Mi versadas poemojn pri mia sperto en Nagasaki. Jen estas unu el tiuj poemoj.



Ne estingu la subbrulojn

La 11an de aŭgusto 1945
Bruligita urbo Nagasaki.

Tie kaj ĉi tie
ankaŭ hodiaŭ
subbrulas
multaj fumo.

Foje nigre, foje flave,
ŝanĝiĝas la koloroj.

En la kavo apud la strato,
apud la rompiĝinta muro,
tavole kuŝas kadavroj,
Aĥ tiuj kadavroj brulas.

En ventoj
fumo kurbigigas,
foje rektiĝas,
fumo, fumo,
ĉu ili estas
aŭ bedaŭro fortiĝanta eĉ post la morto,
aŭ senvoĉaj voĉoj
vokantaj gepatrojn kaj gefilojn?

Sennomaj homoj,
ĉu vi
jam brulmortigitaj
per varmegaj lumoj el la atombombo,
nun, denove, en tiu kavo,

brulas kiel fajro?

Senvoĉaj homoj,
el tiu ĉi infera mondo,
kie ĉio perdiĝis,
profundan malĝojon,
bolantan koleron,
kolektu kaj bruligu,
kaj neniam estingu la subbrulojn.

Alta estas la ĉielo de Nagasaki.

(En la tria tago post la katastrofo dum kremaciado de kadavroj, mia koro estis plenplena de koler.)



Bildo desegnita de atombombito

En la projekto desegni sperton en Hiroŝima kaj Nagasaki multaj atombombitoj partoprenis. Aperis libroj kaj okazis/as ekspozicioj.

STATISTIKOJ

Ducentkvardeksep miloj! les gefratoj, iesgefiloj - Ducentkvardeksep miloj!	La ekbrilego sur la muro stampis Por ĉiam silueton de la viro Kiu ombrante sidis; iu rampis Sur la pavimo, la militmartiro	Unika ĉiu, kaj al iu kara - Anstataŭebla hom' neniam estis, Naskita per doloro mortamara, Amata kaj amanta — kio restis? Monstro tordiĝis sur inferofundoj, Larvoj tordrampis en la vivaj vundoj. Ducentkvardeksep miloj!
La sumo tro grandiĝis por signifi, Sed ĉiu estis homo, kiu sentis, Kiu vundiĝi povis, kaj soifi, Kiu kriegis, mortis, kaj silentis.	Kiu per puso, sango, ekfeteris, Kiu per la okuloj blindaj ploris: Ducentkvardeksep miloj!	
Nek sangas statistikoj nek kriegas; Sumojn sen larmoj oni jam tralegas. Ducentkvardeksep miloj!	Antaŭ la bombo, ĉiu havis sangon, Lipojn, okulojn, generajn organojn, Kaj ĉiu havis nazon, haŭton, langon,	Ciferoj, nuloj! Ĉiu estis homo, Sangantaj statistikoj, homaj nuloj! Sen haŭto, vidkapablo, lipoj, nomo Iu kuŝiĝis - sumoj kaj formuloj! Gepatroj kaj gefratoj kaj gefiloj, Ducentkvardeksep miloj!
Malsamaj estis ili, kaj unika Estis la ĉiu ununura li, Kaj ĉiu vundo nigra aŭ vezika Kaj ĉiu haŭtĉifono, ĉiu kri', Ĉiu brulvundo, ĉiu sangovomo, Povis ekzisti nur per homa homo. Ducentkvardeksep miloj!	Multajn sentemajn nervojn kaj membranojn, Ĉiu posedis homan nervsistemon. Nun karbigitaj buŝoj kraĉis ĝemon. Ducentkvardeksep miloj!	poemo de Marjorie Boulton el POEMOJ POR HIROŜIMO

Neandertalaj homoj pludivas (1)

verkis kaj sendis Roland Platteau, el Francio

En la lasta Turka Stelo mi legis ion, kiu igis min eksalti, ĉar estas temo kiun mi konas, kaj mi jam renkontis ĝin kaj priparolis en (franclingva) artikolo :

Iu Maurizio Brucco rakontas pri la legendoj en Hispanio pri la koboldoj "La spito de la ĉevalo kies voston la kamparanoj trovas matene, post vekigo, nodata per strangaj harplektaĵoj. "

Tion oni trovas ankaŭ en Alpoj, kaj en Ŝekspiro :

"Dans les Alpes françaises (selon Alice Joisten et Christian Abry, "Étres fantastiques des Alpes", Entente, 1995. - Il s'agit de témoignages "légendaires" de personnes âgées, transcrits tels quels), Haute-Savoie, Savoie, Hautes Alpes - il est explicitement question de crinières de juments tressées par des créatures appelées diversement, couramment décrites comme nocturnes, velues, avec des seins très longs pour celles de sexe féminin (trait en effet typique des hominoïdes reliques de sexe féminin)."

Aller la nuit traire ou têter les vaches, en tout cas boire leur lait, est aussi un trait commun de comportement entre les almastys d'une part, les servans, follatons, carcaris du Dauphiné et de Savoie d'autre part.."

En Angleterre on attribuait la même choses à un certain Mab :

« ... that very Mab /

*That plaites the manes of horses in the night »
(Shakespeare, Romeo and Julietta, I, 4)"*

kie estis rakontoj pri estaĵoj noktaj, kiuj plektas la kolharojn de ĉevalinoj.

Vera stranga rakonto ! kiu povus elpensi tiaĵon !

Nu, esploristo en Centra Azio pri la "almasty" "nasna" kaj aliaj nomoj kiujn tiuj estaĵoj, kiuj fakte estas la samaj ol la tibeta "Jeti" aŭ la usona "Bigfoot", kaj la origino de la antikvaj legendoj pri faŭno, saturoj, nimfoj, la rusaj "russalka"oj, la francaj "farfadets" aŭ "sotrets", ktp. Do li trovis la klarigon (kaj vidis la agon en kaŝante sin en stablo en la Kaŭkazo : ekzistas en interreto filmeto kie oni vidas lin parolanta kaj la loko,

<https://ru-clip.net/video/wU3rive0bog/almasty-yeti-du-caucase-3-3.html>

Fakte la restaĵaj homeculoj, eble lastaj neandertalaj homoj, oni ne scias, sučas la lakton de la ĉevalinoj en herbejoj dum la nokto (ankaŭ de la bovinoj, sed por la bovinoj estas pli facila, kaj ne

necesas tian gimnastikon). Kaj provu, se vi estas homo, sovaĝa, sed teĥnikaj rimedoj, mamsuĉi ĉevalinon !!! Fakte estas nur unu rimedo : salti sur ŝian dorson, kaj sin pendigi la kapon malsupre por atingi tiel ŝian mamon ! kaj por atingi tion oni devas PLEKTI ŝian kolhararaon, farante el ĝi nodon, en kiu ili metas sian piedon, tiel oni povas resti firme sur ŝia dorso, kaj firme sin lasi pendu la kapon malsupre, ke ili povas per buŝo atingi la mamon de la ĉevalino ! Ili trovis tion kaj praktikas tion, konjekteble de miljaroj. Kaj tiom stranga konduto, kiu ja povus imagi tion ! Nur de jarcentoj kamparanoj konstatis ke ĉevalinoj, kiuj pasis la nokton ekstere, oni retrovas ilin kun la kolhararon plektita, do ili elpensis fean estaĵojn kiu faras tion. Kaj tiu rakonto troviĝas en Anglio (vd supre Mab) en Francio

(la "Farfadets" kaj : Hautes Alpes - il est explicitement question de crinières de juments tressées par des créatures appelées diversement, couramment décrites comme nocturnes, velues, avec des seins très longs pour celles de sexe féminin (trait en effet typique des hominoïdes reliques de sexe féminin).

Do nun ankaŭ en Hispanio ! Vere ĝuiga kaj interesa ekscii tion ! Se vi deziras mi povas provi verki artikolon kie i reprenos la rimarkon de via korespondanto hispana, kaj artikolojn, kiujn mi ja esperantigis pri tiuj estaĵoj (mimetas du en aneksita dosiero)

Kore,

Roland Platteau el Francio



Solvo de la krucvortenigmo



N	O	T	U	N
O	D	U	T	V
D	N		F	P
R	E	T	N	I
O	C	R	E	S

Kelkaj vortoj pri la mandolinoj

Mia patro ŝerce nomis sian mandolinon mia fianĉino. En Gräfenhainichen ekzistis mandolina grupo. Tiu ĉi estis estrita de s-ro Karl Heinrich. Li ludis mandolinon, mandolon kaj violonon. Ekde 6 jaroj mi ekzercis ludi mandolinon kune kun mia patro. Kiam la delikataj fingroj doloris pro premoj de la kordoj, mi provis ludi per fingrogantoj. Tio ne vere funkciis. Kun la paso de la tempo mi akiris protektajn korneojn sur la fingropintoj de mia maldekstra mano. Pere de tio mi povis pli longe ekzerci. Mia patro pacience montris al mi simplajn infanajn kantojn ekz.: "Ĉiuj miaj anasetoj", "Joĉjo malgranda", "Vulpo vi ŝtelis la anseron", ktp.

Baldaŭ mi ricevis seriozan mandolininstruadon fare de sinjoro Heinrich kontraŭ 5 markoj po horo. Mia patrino havis belan kantvoĉon. Mi ankaŭ ŝatis kunkantadon, sed mi ne kantis tiel bele kiel ŝi. Ĉe ni estis la endoma muziko flegita pere de popolaj kantoj. Mia patrino ŝatis



interalie: "En bela valo staras", "Ĉe l'puto antaŭ l'urbo" kaj rusaj kantoj kiel "Suliko" kaj "Vesperaj sonoriloj". De ŝi mi ankaŭ lernis kanti la duan voĉon kaj ludi laŭ ĝi. Ofte ni ludis kaj kantis duvoĉe: "Dum fluas klaraj fontoj". En la grupo ni ludis i.a. "Bona sono!". Mi ekzercis tion duvoĉe kun mia patro. La mandolina grupo foje ludis antaŭ la iama hospitalo vid-al-vide de la Paul-Gerhard-kapelo. Tra la malfermitaj fenestroj la pacientoj aŭskultis la belegajn melodiojn.

Pro solenaj okazoj, kiel naskiĝtagoj, mia junular-soleniĝo, kaj unu jaron poste okaze de mia konfirmacio, la tuta grupo venis kaj ludis. Mi memoras al membroj kiel s-ro Walther Salzmänn, lia filino Christa Salzmänn, s-ro Hermann Schleif kun filino Gerda Schleif, s-roj Walter Apelt kaj Rudolf Heldt. Kun s-ro Scheithauer, kiu ludis la trumpeton en rulseĝo kaj s-ro Heldt, kiu ludis la bandonion spektakle superkape, la patro pasigis horojn kun la mandolino ĉe la antaŭurba lageto.

Dimanĉe migris miaj gepatroj kun mi multajn kilometrojn al ekskursaj restoracioj, mia patro antaŭ ni kun la mandolino. Mi pene apenaŭ povis sekvi kun miaj pli malgrandaj kruroj kiel infano. Alveninte je la

verkis kaj sendis Helga Plötner, el Germanio

digo-muelilo, mia paĉjo trinkis plejparte 1 - 2 bierojn. Mi ricevis la deziratan ruĝan limonadon. Kaj mi grimpis en la grandan balanĉilon. Iam poste mi eternigis la digo-muelilon laŭ 2 malnovaj fotoj per nigra kreto. Foje ni migris tra la arbaro, preter je la restantaj fundamentoj de la Breitewitz-muelilo ĝis Jösigg.




Tie estis arbara restoracio. Apude sur la la herbejo min allogis 2 infanaj balanĉiloj kaj baskulo. De Jösigg mi pentris akvarelon. La bildon troviĝas nun ĉe aĉetantino. Mi havas ankoraŭ nur fotojn de la bildo. Tradicio estis en nia familio la mandolinoludo kaj kantado de kristnaskaj kantoj antaŭ la disdono de donacoj je la 24an de decembro. Ankoraŭ hodiaŭ mi rememoras al tiu bela tradicio kaj al miaj gepatroj. Tiam mi ludas la mandolinon.

Postparolo.

Dum la gvidado tra la muzeo de nia urbo kun la nove instalita muzikĉambro, mia filino Jana ekhavis la ideon, transcedi la historian ventro-mandolinon de mia patro Richard Langwagen (1907 - 1996) al la muzeo. Krome kelkajn muziknotojn. Mia patro havis tre interesan propran muziknotosistemon. La fretoj de la kordoj G D A E (ŝerce li diris germane: Geh Du Alter Esel) estis nomitaj pere de nombroj anstataŭ de la muziknotoj. 5 G = C, D, la gamo pluen: 2 D, 3 D, 5 D, A, 2 A, 3 A = la alta C-sono. La notojn skribis s-ro Heinrich pere de mirakle belan manskribo. Tiujn muziknotojn mi donacas aldone, por ke ili estos konservataj kiel kulturposedaĵo. Okaze de junular-soleniĝo mi ricevis, kiel propra donaco, de la mandolinogrupo novan platventromandolinon kun engravuritan surskribaĵon: H.L. je la 19.4.59. de la V.M.Gr. Gräfenhainichen. Tiun ĉi ricevas ankaŭ la muzeo de mi. Mi posedas ankoraŭ alian mandolinon, sur tiu mi ludas je diversaj privataj okazoj. Sur mia loĝĉambro ŝranko troviĝas unu mandolino kaj unu liuto. Alian mandolinon mi uzas kiel dekoracio sur la muro, samon faris mia filino. Tiu kun la buntaj rubandoj, sur kiu mi mem ludas, pendas momente en la ateliero. Mia nevo Karl-Julius lernis en Cottbus modernan mandolinoludadon.

Mia filino lernis la gitaroludadon. Ŝia ideo, asigni la instrumentojn kaj muziknotojn al la muzikĉambro en la muzeo, ravis kaj instigis min al reserĉo kaj verkado.



La falsa aŭguro

La grandmonarko de Atlia sendis voki sian intimulon Serva, la ĉefon de la kortega konsilio.

— Nun, — li diris, — kiam la popolo de nia lando festas la dekan jaron de nia regado, oni nepre intencas omaĝi al ni donacojn grandiozajn. Sed tion vi scias pli bone ol ni.

— Ho jes. La Templon de la Dankodiro, la Obeliskon kaj vian Statuon.

— Ni dankas, ne daŭrigu. La planojn ni konas bone. Ni vokis vin tial, ĉar ni sentas, ke ankaŭ nia patra koro devas iom rekompenci la popolon por ĝia fideleco kaj donacemo. Ĉu ne?

— Via popolo jam nun fermis vin en sian koron, ho reĝo, filo de la dioj!

— Nu jes, tion ni scias. Sed des pli konvene estus, ke ankaŭ ni donacu ion al la popolo.

— Ĉu vi pensus pri ia speco de monumento aŭ templo, reĝo dio-generita?

— Eh, ne pri tiaĵoj, kiuj kostas multan monon. La popolon jam pli ol sufiĉe ŝarĝas ĝiaj propraj donacoj. Kial ĝin ŝarĝi ankaŭ per la niaj?

— Senlima estas la boneco de via koro, ho diogenerita reĝo!

— Ni pensis pri amnestio al la malliberuloj.

— Kiel do, grandmonarka moŝto! — timiĝis Serva. — Ĉu vi liberigus eĉ vian kuiriston, kiu ŝtelis vian orpokalon?

— Nu, kompreneble, ni ne pensis pri li. Ĝuste tial ni sendis voki vin. Ni volas vin komisii, ke vi priesploru en la ŝtataj malliberejoj, kiu, kial kaj kian punon ricevis. Ni vin komisias priesplori per via saĝo kaj fidelo, kiu povos ricevi amnestion aŭ pun-malpliigon. Sed ni pensas, ke vi jam aŭdis kaj komprenis ĉion. Iru do fari vian taskon.

— Nu, nia kara servisto, provoso Patra, donu al mi la liston de la malliberuloj!

Patra alportis la liston kaj genuflekse ĝin transdonis al la ĉefkonsilisto Serva.

— Do ni iru laŭvice. Jen estas: «Brut, rabisto». Liaj kulpoj?

— Li rabmurdis malriĉajn komercistojn dum la foiro.

— Ĉu nur tiaj bagateloj?

— Jes. Sed foje li atakis ankaŭ grandsinjoron Ptalm, nian noblan bonfaranton, luanton de la kortegaj bienoj (nun Patra ree genufleksis kaj tuŝis per sia manplato sian frunton, signante altegan honoron). Sed kiam li eksciis, kiu sidas en la veturilo, li forkuris kiel freneza.

— Jen lia feliĉo. Amnestion al li. Plue. Sekvas Talme. Kion li krimis?

— Li spionadis komisiite de la lando Antissa. Li penetris ŝtele en aristokratajn rondojn, ŝtelakiris militajn sekretojn kaj elliveris ilin al la registaro de Antissa.

— Hm. Pli grava afero. Kiom estas lia puno?

— Dumviva mallibero.

— Ĝi mallongiĝu en du jarojn. La tria estas Rata. Kion li faris?

— Vi eble scios tion, kvankam ni devis tion sekreti. Li estas la falsa aŭguristo.

— Jes, mi memoras pri io... landpereco, drono en Oceano...

— Jes, jes. Pri la murmuroj, kiuj antaŭ du monatoj aŭdiĝis el sub la tero, niaj aŭguristoj deklaris unuanime, ke ili estas dia revelacio: dio Kantra koleras kaj atentigas nian landon, ke li ne toleros plu la impertentecon de Antissa, li postulas, ke ni ekstermu ĝian popolon. Tial nia grandmonarko ordonis tiam armadon kontraŭ tiu lando.

— Jes, — diris Serva. — Mi scias, eĉ, ke Rata havis ian opinion kontraŭan. Kion li diris?

— Mi ne miras, grandsinjora moŝto, ke vi ne scias tion precize, kvankam vi scias ĉion. Sed estis severa ordono malhelpi la disvastiĝon de la danĝeraj doktrinoj de Rata. Eĉ la plej altrangaj moŝtoj apenaŭ ricevis informon pri tio.

— Kion do li asertis?

— Tion, ke la murmuro ne devenas de la kolero de dio Kantra, sed ĝi estas spontana termurmuro. En la terprofundo estis grotoj; ili enfalis, kaj ties bruon ni aŭdis. Li aŭdacis deklari, ke nia kontinento post du monatoj malaperos en la oceanon. Do ni ne armadu, sed prefere ni interpaciĝu kun Antissa.

— Terura defetismo!

— Sed, feliĉe, niaj altaj instancoj tuj kontraŭagis. Niaj pastroj deklaris liajn doktrinojn herezaj, pruvis el la

>> 22

Movada temo: UN 75-jariĝas: Esperanto bezonas Unuiĝintajn Naciojn, sed Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn

■ Renato Corsetti

Malgraŭ la disvastiĝo de potenĉegaj komunikaj iloj aŭ eble ankaŭ pro ili, la mondo restas ĉiam la sama, ĉar homoj restas samaj kun siaj virttoj kaj malvirttoj. Certe ekzistas la esperantistoj, kaj ilia toleremo kaj komprenemo por aliaj homoj kaj popoloj kaj ilia serĉo pri justeco, egaleco kaj paco. Sed samtempe ekzistas multaj aliaj homoj, kiuj predikas malamon kontraŭ la plej malfortaj, maltoleremon al aliaj kulturoj, perforton por solvi konfliktojn. Unuvorte, la nuna mondo estas kiel la mondo en la tempo de Zamenhof aŭ eĉ en la tempo de la antikva Babilono. La mondo ŝanĝiĝas nur pri detaloj, ne pri la kerno.

Eĉ male, dum la lastaj jardekoj progresas en multaj lokoj de la mondo maltoleremo kaj perforto ĉiam pli kaj pli.

En ĉi tiu situacio Esperanto restas, por uzi la versojn de Kalocsay:

Ne glora kaj fiera,

*Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

Fortoj, kiuj esprimis de tempo al tempo sian subtenon al Esperanto, estas la mondaj organizaĵoj, kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ĉar principe ili havas la samajn celojn kiel ni: plibonigi la mondon. Pro tio ni bezonas ilin por disvastigi Esperanton en la mondon. Diris Zamenhof: "La registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta".

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko povus esti nia aliancanoj, eĉ se en la nuna mondo ankaŭ ili ne fartas tre bone.

Se UN vokas, UEA respondas.

Ne hazarde la kongresa temo en la venonta UK en Montrealo estas: "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo."

La vortumo de la temo sekvas la ŝablonon de UEA pri neŭtraleco kaj

pozitiveco ĝis la morto, ĉar, kiel mi diris antaŭe, la mondo estas ĉiam la sama kaj eventuale malpliboniĝas, eĉ se ni kaj UN volas dialogon kaj interkompreniĝon.

Nu, kongresaj temoj estis ofte ĝis nun nur ĝenoj por la kongresanoj, tuj forgesataj antaŭ ol eniri la vagonaron aŭ aviadilon por reveni hejmen. Ĉu vi ne kredas min? Bonvolu citi la lastajn 5 kongresajn temojn de la UK-oj, kiujn vi ĉeestis!

Ĉi-jare la afero volas esti pli serioza kaj jam oni faras grandajn provojn aranĝi plenajn kunsidojn pri la temo, dissendojn al neĉeestantoj, kaj eblon de neĉeestantoj aŭdigi sian voĉon. Koloraj flagoj flirtos kaj oratoroj oratoros, ktp.

Tio estas io bona. Finfine oni parolos pri io serioza kaj serioze ligita al Esperanto; sed tio, laŭ mi ne sufiĉas.

Mi pensas, ke ĝi devas iĝi "movada temo", temo de la tuta movado, ankaŭ por tiuj multaj, kiuj pro multaj kialoj ne povos vojaĝi al Montrealo. Ne temas pri festado de la 75-jariĝo de UN, temas pri decido pri tio, kion ni povas fari por helpi UN-on atingi 100 jarojn, por ke ĝi helpu nin plibonigi la mondon per Esperanto.

Ni devas debati pri tri grandaj agadkampoj de UN kaj Unesko:

Homaj rajtoj. Ĉu ni volas aŭ ne, ni estas la solaj batalantoj en la mondo por la lingvaj homaj rajtoj, kontraŭ diskriminacioj bazitaj sur la lingvo, kiel UN estas la batalanto pri homaj rajtoj ĝenerale. Bonvolu legi ree la deklaron pri homaj rajtoj, kiun vi trovas en Esperanto en <https://tinyurl.com/yxd7uv5v>, debatu pri ĝi en via loka klubo kaj en via landa informilo. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, por ke ili konsideru vian opinion dum la pretigado de la rezolucio, simple skribu al mi, renato@esperanto.org, kaj mi komunikos tion al ili.

Paco. Memoru niajn glorajn tradiciojn pri paco, de la kontaktoj kun

Bertha Von Suttner ĝis la esperantistoj mortigitaj de faŝismaj, militemaj reĝimoj tra la mondo. Se vi ne ŝanĝis vian opinion pri tio, vi eble volos subteni la agadon de UN por eviti armilkomercadon kaj entute militojn. Diskutu ankaŭ pri tio en via loka klubo aŭ en via landa informilo. Informiĝu pri la sistemo de UN-asocioj, <https://tinyurl.com/y4cpdjlh>, kaj de Unesko-klubo, <https://tinyurl.com/y5a9v42o>, kaj kunlaboru kun ili loka aŭ lande. Raportu al UEA pri via kunlaboro.

Evoluo. Mia daŭra manĉo/slogano estas, ke ni volas pli bonan mondon, pli justan mondon en la kampo lingva-kultura. UN kaj Unesko volas pli bonan mondon ĝenerale.

Kion ni povas fari tiurilate? Aldone al tio menciita en la punkto ĉi-supre bonvolu legi ĉi tion: <https://tinyurl.com/y4755pbs>.

Diskutu pri tiuj celoj en viaj lokaj grupoj kaj en viaj landaj informiloj. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, agu same kiel ĉi-supre: skribu al mi, renato@esperanto.org, kaj mi komunikos tion al ili.

Unuvorte, informiĝu pri UN kaj Unesko kaj disvastigu Esperanton kiel elementon de la programo de UN kaj Unesko por plibonigi la mondon.

Fine, se vi volas esti aparte afablaj, reaperigu ĉi tiun artikolon en via loka bulteno, fejsbuka paĝo, landa informilo ktp.



Eble ne ĉiuj scias, fakte kiucele mi eklernis ĝin. Mia plej granda ŝatokupo jam junaĝe estis la korespondado. Mi ne havis sufiĉajn korespondamikojn.

Neniam mi forgesos tiun printempan tagon, kiam frumatene mi iris perpiede al mia tiama laborloko, kaj ankaŭ tiam mi cerbumis pri tio, kiel mi povus havigi novajn geamikojn.

La firmamento estis ĉielblua, tamen fulmosimile frapis min vorto: ESPERANTO!

Por momento mi eĉ haltis, tiel ŝokis min la malnova memoraĝo de oĉjo Eŭgeno, amiko de nia familio, kiu entuziasme rakontis al miaj geonkloj pri iu mirakla lingvo, kiu estas ne nur bela, sed ankaŭ tre facila.

Li rakontis pri liaj korespondamikoj el Pollando, Francio, eĉ Japanio.

Do, la unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto antaŭ 80 jaroj! Kaj nun, mi rememoris pri ĝi!

Mi petis la helpon de nia maljuna amiko.

Oĉjo Eugeno permanence skribis al mi lernolibron, poste ankaŭ vortaretojn.

Entuziasme mi eklernis la lingvon. Unue mi korespondis nur kun mia Esperanto-profesoro, oĉjo Eŭgeno.

Li abonis por mi la bulgaran gazeton „Nuntempa Bulgario”, kaj mi baldaŭ ekkorespondis ankaŭ kun alilandaj esperantistoj.

Poste mi aŭskultis la ĉiutagan Esperanto-programon de la Pola Radio.

Skribante al ili, mi ricevis la unuan leteron de Ada Sikorska, tiutempa redaktorino de la radio. Danke al

Ada, en 1962 aperis en Heroldo de Esperanto kies ĉefredaktorino ŝi iĝis mia jena anonceto:

"Mi sopiras je fidelaj, korespondemaj geamikoj. Mi kolektas nek poŝtmarkojn, nek bildkartojn, nek alumetetiketojn, nur amikajn animojn de ĉiu parto de la mondo."

Alvenis 76 leteroj el 25 landoj!

Kun dek el tiuj sepdek ses geamikoj mi renkontiĝis en Sofio en 1963, dum la 48a Universala Kongreso.

Nun danke al Esperanto, mia korespond-pasio plene kontentiĝis.

Kun kelkaj geamikoj mi korespondis dum jardekoj. Bedaŭrinde, multaj el ili jam mortis.

Nun mi eldonas libron kun la leteroj de kvin miaj tre bonaj geamikoj, memore al la sincera amo kaj vera amikeco de: Ada Fighiera-Sikorska (Pollando-Italio), Johannes Palu (Estonio), Nikolao Danovskij (Sovetio), Stanislaw Janusiewicz (Pollando) kaj Tibor Sekelj (Jugoslavio).

Per ĉi tiu libro mi esprimas mian dankemon al ĉiuj miaj geamikoj, kiujn mi havigis, danke al la neforgesebla d-ro L.L. Zamenhof, ĉar la Internacia Lingvo Esperanto estas vere nekomparebla!

de Julia Sigmond el Rumanio

fonto: <http://verkoj.com/verkistoj/julia-sigmond/90/kial-mi-lernis-esperanton/>



Antaŭ 110 jaroj frontpaĝe de "Pola Esperantisto" aperis la poemo "Nova jaro" de Lozo. Temas pri pseŭdonimo de d-ro Leono Zamenhof (1875-1934), frato de LLZ, laringologo kaj esperantisto (ekde 1898), membro de la Lingva Komitato (1909-1934), korespondanto de la Lingva Akademio (1925-1934) kaj kunlaboranto de "Literatura Mondo". Li estis redaktoro de "Pola Esperantisto" en la jaroj 1908-1913.

Nova jaro

*Novan turnon ĵus finis la tempo,
Freŝan paĝon komencas homaro,
Fermis pardon la vivo pasinta,
Nin alvokas al ag' nova jaro.*

*Ĉu pesante la lastan rikolton,
Per malĝoj' ni plenigos la koron,
Ke ne dece ni portis standardon,
En batal' al ni mankis fervoro?*

*Aŭ fiere ni levos la frunton,
Rigardante la fruktojn kun ĝojo,
En la koroj sentante la flamon,
Kaj la forton ne fali sur vojo?*

*Gaje sonas responde tintiloj,
Bruas venke standard' kun fiero,
Super mi ĉiam lumas la stelo,
Klara, brila, la stel' de espero.*

La malfeliĉulo venis, lackonsumita, al iu vilaĝo; li ja nenion manĝis jam de du tagoj. La malsato inspiris al li bonan ideon. Li iris flustri de pordo al pordo:

- Mi konas mirindan planton, kapablan eĉ revivigi mortantojn! Kiu volas dividi mian sekreton?

Iu riĉulo haste invitis lin kaj oferdonis al li veran bankedon.

Post la manĝo, la gastiganto faris aludon al la planto kun mil efikoj.

Venu do kun mi, ĝi abunde kreskas en la ĉirkaŭaĵoj, asertis la viro. Kaj ĉiuj diskrete eliris. Tuj kiam li trovis sin sufiĉe malproksime de la vilaĝo, la

kanajlo haltis kaj fingre montris la rizkampon:

- Jen la planto, kiu faras miraklojn.

- La rizplanto? Ĉu vi ne ŝercas?

- Tute ne! Sen la bonega rizo, kiun mi manĝis ĉe vi, mi certe mortus en ĉi-tiu horo!

Kaj la spritulo grandpaŝe forkuris.

Elтираĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-mirinda-planto/>

Vortareto

- * **aludo** - paroli pri iu aŭ io, ne uzante la propran nomon aŭ vorton, sed tamen iel komprenigante, pri kiu aŭ kio temas.
- * **aserti** - firme esprimi sian opinion, ke io estas vera.
- * **flustri** - paroli, ne vibrigante la voĉajn kordojn.
- * **hasti** - agi kun nekutima, nenormala rapideco.

- * **kanajlo** - senhonora homo, kun malnoblaj instinktoj.
- * **miraklo** - fakto, kiu ŝajne estas kontraŭa al la ordo de la naturo, kaj kiun la kredantoj atribuas al dia interveno.
- * **sprita** - posedanta spiritan viglecon, kiu ebligas rapide trovi kaj originale esprimi neatenditan rilaton inter malsamaj objektoj aŭ malsamaj vortoj.

>>>

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistoj



ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Esperantystów Polskich

Januaro, 1909.

WARSZAWA — VARSOVIO.

Jaro II (IV). № 1.

*Ĝoje festas amika tendaro
Jaron venkan post pena laboro
Kaj al nova pretiĝas nun vojo
Por daŭrigi batalon kun gloro.*

*Nova jaro, malfermu do pordon,
Al ni vojon ne baru al celo,
Ne timigos nin tondroj, ventegoj,
Ĉar espera kondukas nin stelo!*

Lozo

Fonto: **Pola Esperantisto**, januaro 1909
Skanaĵo de Aŭstria Nacia Biblioteko

NOVA JARO.

Novan turnon ĵus finis la tempo,
Freŝan paĝon komencas homaro,
Fermis pordon la vivo pasinta,
Nin alvokas al ag' nova jaro.

Ĉu pesante la lastan rikolton,
Per malĝoj' ni plenigos la koron,
Ke ne dece ni portis standardon,
En batal' al ni mankis fervoro?

Aŭ fiere ni levos la frunton,
Rigardante la fruktojn kun gojo,
En la koroj sentante la flamon
Kaj la forton ne fali sur vojo?

Gaje sonas responde tintiloj,
Bruas venke standard' kun fiero,
Super mi ĉiam lumas la stelo,
Klara, brila, la stel' de l'espero.

Goje festas amika tendaro
Jaron venkan post pena laboro
Kaj al nova pretiĝas nun vojo
Por daŭrigi batalon kun gloro.

Nova jaro, malfermu do pordon,
Al ni vojon ne baru al celo
Ne timigos nin tondroj, ventegoj,
Ĉar espera kondukas nin stelo!

Lozo.



Tri eroj el la lernolibro „Vojaĝo en Esperanto-Lando“
de Boris Kolker

KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Mi tute ne volis esti esperantisto. Mi malŝatis la ideon de artefarita lingvo. Mi argumentadis kontraŭ ĝi, diskutante kun mia amiko kaj kolego, fervora esperantisto.

Li volis konvinki min pri alta kvalito de Esperanto kaj pri neceso de neŭtrala lingvo internacia. Sed laŭ mi Esperanto estas nur surrogato kaj nekapabla esprimi delikatajn sentojn – kaj ĝi ne taŭgas kiel lingvo de scienco, diplomatio kaj poezio. Tiel mi argumentis energie kaj brave kontraŭ mia amiko kaj klopodis ridindigi la objekton de lia granda amo.

Li brave defendis sian aferon, sed mi, nekonate la faktojn, evidente „sciis“ pli bone ol li.

Jam longe mi miris pro tio, ke li – prudenta homo kaj inteligentulo – deziras okupi sin pri tiom naiva ideo kaj perdi sian valoran tempon por tia stultaĵo.

Tion mi diris al li, diskutante, kaj mi konsilis al li forĵeti sian absurdan ideon de artefarita lingvo: „Tia lingvo ja ne vivas; ĝi ne havas jarmilan evoluon kiel naciaj lingvoj. Al ĝi mankas la forto kaj la suko de vivo... kaj ne kredigu min, ke dek ses reguloj povas krei lingvon plene kapablan esprimi ĉion, kion pensas la homa cerbo...“

„Vi parolas pri io, pri kio vi scias nenion. Vi pensas, ke Esperanto estas tia, kia vi diras. Vi diskutas pri afero, pri kio vi scias nepre nenion. Oni povas diskuti nur pri temoj konataj. Tial mi petas vin kunpreni ĉi tiun lernolibron kaj ĉi tiun broŝuron pri Esperanto. Tralegu ambaŭ. Post tio revenu. Tiam ni havos bazon por diskutado.“

Tiel parolis al mi mia amiko antaŭ multaj, multaj jaroj. Tuj la vortoj ŝokis min, ĉar verdire, li pravis, dirante, ke oni povas diskuti nur tion, pri kio oni scias almenaŭ ion. Tro ofte oni emas esprimi sian „pretan“ opinion, kvankam oni ankoraŭ ne havas eblon por studi kaj pripensi la temon.

Tiuj vortoj antaŭ multaj, multaj jaroj fariĝis mia sorto, ĉar mi akceptis inviton je vortduelo kaj prunteprenon de la proponitaj libretoj.

Hejme mi eksidis por fervore kaj energie studi la materialon. Mi prenis kraĵonon en la manon por noti multajn punktojn de kritiko kaj kondamno. Mi volis prepari min por vigla diskuto kaj komplete konvinki lin, ke ne li, sed mi pravas.

Sed... mia kraĵono nenion notis, nenion kondamnis.

Ju pli mi legis, des pli kaptis min la strukturo de la lingvo kaj la genia konstruo de la gramatiko. Mirigis min la sistemo de vortfarado, la simplaj tempoformoj de la verbo, la praktika solvo de la akuzativo, la korelativa sistemo ktp.



Unu horo pasis post la alia. Komence mi nur observis, sed poste mi ankaŭ lernis, studis, klopodis memori. Ne daŭris longe, ĝis mi komencis entuziasmiĝi pro la lingvo mem... kaj poste ankaŭ pro la interna ideo. Saŭlo fariĝis Paŭlo, malamiko fariĝis amiko.

Pasis unu semajno, eble kelkaj tagoj pli. Mia amiko-kolego kaj mi renkontiĝis laŭ interkonsento. Mi tuj redonis al li la librojn. La enhavon de la lernolibro mi jam sciis. Li miris, kiam mi petis rigardi lernolibron por progresantoj. Li bezonis kelkajn tagojn por plene kompreni, ke mi efektive fariĝis esperantisto kaj... ke mi intencas stari ĉe lia flanko en la paca batalo por disvastigi Esperanton kaj la scion pri ĝi.

Kaj vere: tiel okazis. Strange: kelkajn jarojn poste li fariĝis malpli aktiva, kaj post kelkaj pliaj jaroj li plu ne okupis sin pri nia afero. Ofte oni miras, ke io tia estas ebla; ke flamo, tiom arde brulante, povas estingiĝi... sen ia videbla kaŭzo! Mi suspektas, ke kaŭzo estas lia edzino... ĵaluzo. Poste mi spertis, ke ofte ĵaluzo de edzinoj aŭ edzoj kaŭzas malaktiviĝon, aŭ eble eĉ, ke li aŭ ŝi tute forlasas la movadon.

Io tia ne okazis al mi, ĉar mi edziĝis al samideanino, kiu estis ne nur aktiva, sed ankaŭ entuziasma por nia afero. Kaj ĉar ŝi estis eksterlanda, ni interparolis nur esperante. Tiel ni spertis, ke Espeanto taŭgas ankaŭ kiel hejma, kiel familia lingvo.

Kiel sekretario de nia landa Esperanto-instituto, kies ĉefa celo estis inviti eksterlandajn Cseh-metodajn geinstruistojn kaj organizi iliajn kursojn, mi havis la taskon kontakti ĉiujn persone, kaj plej ofte tio okazis en mia hejmo. Kia feliĉo, ke mi havas edzinon, kiu estas samideanino, kaj kiu povas perfekte kaj flue konversacii kun ĉiu verdstela gasto. Ni gastigis en nia hejmo esperantistojn el preskaŭ ĉiuj landoj, el preskaŭ ĉiuj kontinentoj. Imagu, kiom riĉa sperto paroli kaj diskuti kun anoj el tiom da nacioj! Nur per Esperanto ni havis tiun riĉan sperton. Nur per Esperanto tio estas ebla.

L.Friis. Eldonisto konfesas // Sub la signo de la verda stelo. –

Åbyhøj, 1964, p. 7-9. Mallongigita.

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotová